

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 8.

Aŭgusto 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

Rezulto de sistema laborado :

Pretigis la IEC-vortaro kun nocioj en kvin naciaj lingvoj kaj Esperanto

Antaŭ nelonge okazis en Torquay (Anglujo) la ĝenerala kunveno de IEC (Internacia Elektroteknika Komisiono). Tiām la partoprenintoj trovis preta la grandan vortaron de IEC (311 paĝoj en formato $21\frac{1}{2} \times 31$ cm.). Ĝi estas vortaro, pri kiu oni internacie laboradis dum pli ol tridek jaroj. Ĝi estas aranĝita ne laŭ alfabeto ordo, sed laŭ parenceco de la nocioj.

Ĉiu paĝo de la vortaro havas kvar kolonojn. Sur la unua kolono troviĝas la numero de la koncerna nocio laŭ la decimala klasifiko. La dua kolono enhavas la nocion en franca lingvo, kun konciza klarigo samlingva. La tria kolono enhavas la saman nocion kaj ĝian klarigon en la angla lingvo. La kvara kolono ripetas nur la nocion (sen klarigo), en la lingvoj germana, itala, hispana kaj Esperanto.

Pri la antaŭlaboroj por la IEC-vortaro « Heroldo de Esperanto » detale raportis en sia numero 28 (837) de 14.7.1935. Ni ne povas hodiaŭ detale ripeti ĉion, kio jam estis raportita tie. La apliko de Esperanto en tiu gravega vortaro estas unu el la plej atentindaj sukcesoj, kiujn nia afero iam povis noti ĝis nun. Tiu ĉi sukceso estas atingita post longa sistema kaj koncentrita detallaboro, pri kiu la ordinara samideano eĉ ne povas fari al si imagon.

★

La IEC-vortaro estas ricevebla ĉe : I.E.C., 28 Victoria Street, Westminster, London S.W.1. — Prezo 10 ŝilingoj, bind

Kongreso de EANA prenis gravajn decidojn

« Heroldo de Esperanto » anoncis kaj reklamis la Kongreson de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko sub la titolo « Freŝa vento el Usono ». Efektive (skribas al ni s-ano Joseph W. Dubin el Philadelphia pri la kongreso, kiu okazis dum la unuaj tagoj de julio en Cleveland, Ohio) freŝa Esperanto-vento nun blovas el Usono, vento kiu eble iĝos Esperanto-uragano, ĉar la EANA-kongreso faris decidojn kiuj povas konduki al enkonduko oficiala de Esperanto en la oficiala vivo de la lando. Jene : leĝfara komitato devas skribi leĝproponojn por la oficiala enkonduko de Esperanto en la diversaj sferoj de la nacia registaro kiuj tuŝas al la eksterlanda vivo, kaj en la lernejoj de la diversaj ŝtatoj egalpiede kun aliaj lingvoj. Sama komitato devas elpensi planojn por la kampanjo al tiuj celoj kaj organizi la agadon.

Duaflanke, EANA decidis peti de granda mondonaca dotajo en Novjorko gravan sumon por starigi Esperantajn instituciojn. Kaj ni rajtas esperi ian sukceson, ĉar ni jam ricevis de la koncerna dotajo la permeson fari proponon.

Triaflanke, ni ĵus legis pri decido de Hollywood'a firmo fari Esperanto-filmon. Tiu decido eble ne estas firme fiksita, kaj bezonigas multajn leterojn el la tuta mondo por urĝa kuraĝigo de la firmo M.G.M. en Hollywood, Los Angeles, Calif., Usono, en ĝia intenco. Mi do petas la tutmondan samideanaron skribi tuj al s-ro Clarence Brown (direktoro de la firmo), c/o M.G.M. Studio, Hollywood, Calif., Usono.

La tria afero estas facila por la samideanoj, ĉar ili nur bezonas skribi leterojn multnombre. Sed la du aliaj estas malpli facilaj, ĉar ili bezonas unuecan forton en la movado. Por efektive imponi al la registaro kun nia leĝpropono, ni devas povi montri unuigitan mondmovadon. Same por imponi al mondotajo.

Tiacele EANA adoptis rezolucion pri unueca movado, kaj pri paŝoj al ĝi. La nacia sekretario baldaŭ transdonos tiun rezolucion al la koncerna ofico.

Esperanto-afiŝoj ĉe poŝtaj giĉetoj en Francujo

Laŭ informo aperinta en la Oficiala Bulteno de la franca PTT-Administracio, n-ro 18, paĝo 447, de la 21-a de junio 1938, la poŝtestroj rajtas pendigi ĉe la giĉeto afiŝon, kiu anoncas al la publiko, ke nia lingvo Esperanto estas uzebla en la poŝtejo, kiam deĵoras esperantista oficisto.

Inter aliaj, en la Pariza Ĉef-Poŝtejo, nomata ĉi tie « Recette Principale des Postes et Télégraphes de la Seine, 52, rue du Louvre », la esperantistoj povas esti helpataj, koncerne la PTT-servojn, ĉiutage de 9 h. matene ĝis tagmezo, kaj preskaŭ ĉiutage de 15 h. ĝis 18 h. (La poŝtejo ne estas malfermita dimanĉe.)

Ĉar la ordono celas komplezi al la eksterlanda klientaro, ĝi rilatas sen ia dubo ankaŭ al la skribaj petoj, speciale al la mendoj pri ĵus eldonitaj poŝtmarkoj, kaj tiu ĉi informo havos tre kredible intereson ĉe la poŝtmark-kolektantoj, kies mendoj estas sendeblaj al la menciita poŝtofejo.

El la kongres-urbo

Inauguro de la Selfridge-Esperanto-Klubo

La direkto de ĉi tiu grandmagazeno ĉiam faris ĉion eblan por ebligi al la membroj de la organizaĵo pligrandigi siajn ĝeneralajn sciojn. Pere de la Selfridge-Eduk-Oficejo la anoj kontaktiĝas kun tre bonaj komercaj lernejoj, kaj en la magazeno mem oni ofte aranĝas prelegojn kaj demonstraciojn pri komerco, vendado kaj administrado por eduki membrojn, elektitajn por promocioj al pli altaj postenoj.

Antaŭ nelonge estis aldonata al ĉi tiuj klopodoj *kurso pri Esperanto* sub la tre eminenta gvidado de f-ino Margarete Saxl, kiu vekis tian entuziasmon ĉe la gekursanoj, ke oni esprimis urĝan deziron starigi *vesperan konversacian klubon*.

S-ro Clarble, la direktoro de la personaro de Selfridge, al kiu oni transdonis ĉi tiun peton, akceptis ĝin kun kontentigo kaj kora intereso.

Sekve de tio nombro de entuziasmaj esperantistoj kunvenis unuafoje lundon vespere, la 27-an de junio, en la Selfridge-Socia-Klubo, kiun la Direkto senpage disponigis al la esperantistoj.

La anoj de la klubo elektis kiel klubgvidanton s-ron A. H. Rogers.

Laborplano estas nun ellaborata, plena de variaĵoj kaj interesaĵoj kun la helpo de f-ino Housland, interpretistino (kiu nun krom la signoj, montrantaj ŝian scion pri franca, germana, itala, hispana lingvoj fiere portas la verdan stelon) kaj de s-ro J. Dundas-Grant, tre kulturita lingvisto. Tre baldaŭ oni komencos korespondadon kun esperantistoj en aliaj landoj.

La inaŭguro de la Selfridge-Esperanto-Klubo estas grava kaj okulfrapa pruvo por la nesuperebla laboro de f-ino Saxl, tute speciale talenta instruistino, kiu plenigis ĉiun horon de instruado per plezuro, intereso kaj progreso.

A. H. Rogers,

fakestro ĉe Selfridge grandmagazeno.

Estas plezuro lerni Esperanton...

Estas plezuro lerni Esperanton en grandmagazeno. Dum laborhoroj oni permesas al ni partopreni nian kurson, kaj tio donas tre grandan plezuron! Luj trovas ĝin facila; aliaj ne povas tiel rapide progresi. Oni devas havi imagon, kuraĝon kaj humoron, kaj certe ne esti timema. La rekompenco venas kiam du aŭ tri lernantoj kunvenas en unu fako. Tiam ni komencas interparoli kaj ni sentas ke la klientoj miras, iafoje starantaj-aŭskultantaj.

« Kiu estas ĉi tiuj », ili mem diras, « parolantaj unu lingvon malkomprenoblan sed — evidente — ili parolas feliĉe, facile kaj senafekte ? ! ».

Vere ĝi donas al ni memkonfidon.

Malsimila al aliaj lingvoj, se ni ne scias unu vorton, ni povas, kun malmulta imago, konstrui ĝin, kio sanigas la cerbon kaj nin pensigas logike.

Unu metodo de instruado estas la rondvojaĝo tra la etaĝoj. Ni komencas ĉe la supro, kie oni trovas la oficejojn. Multaj skribaĵoj klakas, kaj la plumoj de la librotenedoj skrapas senfine. Liftoj supren kaj malsupren iras, dum iliaj signallumoj ekbrilas ruĝaj kaj verdaj. Sed subirante al la etaĝoj kie ni vendas, ni trovas multajn objektojn, kaj ni devas demandi al nia instruistino — f-ino Margarete Saxl — la nomojn. Tiam ŝi klarigas al ni, kun tioma lerteco, tioma pacienco kaj sen unu vorto de angla lingvo, kaj ŝi komprenigas nin. Niaj notlibroj iĝas plenaj de « hieroglifoj » kiuj devas esti klarigataj poste !

Sed, post ĉiaj niaj penoj, ni esperas ke la Kongresanoj trovos veran bonvenon ĉe ni, ne nur spirite sed ankaŭ en nia mondlingvo.

J. Dundas-Grant,

Administranto por Personaj Rilatoj,
Selfridge & Co. Ltd.

(lerninta Esperanton dum nur 10 instrulecionoj).

Norda Ameriko -- ĉu unulingva kontinento ?

Ofte oni aŭdas la aserton ke Ameriko estas unulingva kontinento, kaj ke tial ĝi ne sentas la bezonon de internacia lingvo. Fakte estas ke en Ameriko la bezono de internacia lingvo ne estas tiom sentata kiom en Eŭropo. Sed aserti, ke Ameriko estas nur unulingva kontinento, ne konformas al la faktoj.

En *Suda Ameriko* oni parolas, krom hispane kaj portugale (Brazilo), multnombrajn indiĝenajn dialektojn; krome, en certaj partoj, france (Gujano), nederlande (Surinamo), angle, germane (multnombre en suda Brazilo), ktp.

En *Centra Ameriko* oni parolas, ĝenerale, hispane, sed ankaŭ angle, kaj multajn indiĝenajn lingvojn. En Meksiko, ekzemple, la hispana lingvo estas vere interŝtata lingvo, ĉar tie oni parolas multajn popolajn lingvojn kaj dialektojn; do, meksikano, vizitanta la ĉefurbon, eble trovas fremdan lingvon en sia propra lando.

Sed eĉ konsiderante sole *Nordan Amerikon*, oni baldaŭ ektrivos, ke tiu kontinento minimume estas dulingva. La franca lingvo estas egalrajta kun la angla en la registaraj aferoj de Kanado. En Montreal estas pli multe da france parolantaj loĝantoj ol en iu alia urbo en la mondo, kun sola escepto de Parizo. Miloj da usonanoj en la nordorienta parto de Usono estas ekskanadanoj kaj konservis sian francan lingvon. En Luiziano, sudusona ŝtato, estas ankaŭ multaj france parolantaj loĝantoj. En la parto de Usono apud la landlimo inter Meksiko kaj Teksaso la hispana lingvo estas tre multe uzata, kaj larĝe komprenebla. La radiostacioj en Usono plejparte uzas nur la anglan lingvon. Tamen potenca stacio en Quebec, ŝtato en Kanado, dissendas preskaŭ ĉion en la franca, kaj tiu ĉi stacio (CKAC) estas aŭdebla preskaŭ ĉie en Usono ĉirkaŭ kaj oriente de la granda lakaro. Negravaj lokaj radiostacioj en Usono oftege sendas unu programon post alia en variaj fremdaj lingvoj. Oni ofte kaptas francan, germanan, italan, judan, polan, serban, hungaran kaj armenan programojn en unu tago. F-ino Lidja Zamenhof parolis pole en Detroit. Ekzistas multego da jurnalaj en fremdaj lingvoj; estas eĉ kelkaj en la ĉina kaj japana lingvoj. En Novjorko loĝas pli multe da italoj ol en Romo mem!

Konklude, oni povas prave aserti, ke Usono ankoraŭ ne estas lando de unu sola lingvo, eĉ malpli la tuta Norda Ameriko.

Usonano.

Jam en Londono

efektivigu vian aliĝon al la
31-a Universala Kongreso de Esperanto !
Jam en Londono

aliĝu por Berno !

Esperanto kaj la scienco

De D-ro *Cyrril Vörös*, hungara matematikisto.
(*Sátoralja újhevely, Piaristák.*)

Prof. G. Mannoury aludas en la komenco de sia artikolo *) la plendon de Einstein pri la perdo de paradizo de l' scienculoj, perdintaj la latinan lingvon, kiu estis internacia lingvo por la sciencoj. Prof. Mannoury detale kaj ĝuste pritraktas la kaŭzojn de la perdo. Mi pensas, ke estus utile, aldoni la koncizan rimarkon: la latina lingvo mem pruvis sian netaŭgecon kiel lingvo internacia, per sia perdo. Se ĝi estus taŭga, ĝi ne perdiĝus.

Ekzistas ankoraŭ nuntempe revemuloj, kiuj volas la renovigon de la latina lingvo kiel internacia, dirante, ke oni devas simpligi tiun lingvon, por ke ĉiu povu ellerni ĝin tre facile. Mi diras al tiuj, ke ĉi tia simpligo estis jam farita antaŭ kelkaj jardekoj de la bonfama, itala matematikisto *Peano*. La vera celo de tiu scienculo estis kompili formularon, per kiu oni povu trakti la tutan matematikon sen vorta teksto, nur per simboloj. Por konigi sian formularon, li eldonis malgrandan broŝuron, verkitan en simpligita latino, « latino sine fleksione ». Tralegante tiun ĉi verkon, mi vidis, ke, se iu volas ellerni la simpligitan latinan lingvon, tiu devas antaŭe ellerni la klasikan lingvon, ĉar la radikoj de ĉiu vorto, substantivo aŭ verbo, estas prenita de la klasika lingvo; devas ellerni ĉiujn deklinaciojn kaj konjugaciojn, kvankam tiuj ne ekzistas en la simpligita lingvo, ĉar sen kono de tiuj oni ne scipovas trovi la radikojn de la vortoj, estantaj diversaj laŭ la diversaj deklinacioj kaj konjugacioj. Do la ekhavo de la latino sine fleksione pretendas la tutan laboron necesan por la klasika lingvo. La simpligita lingvo do ankaŭ ne estas plifaciligita.

Granda profito estus la akcepto de Esperanto kiel internacia lingvo por la scienco ankaŭ por la scienculoj, kiuj sin okupadas pri tiaj specialaj fakoj, kiaj eĉ en la plej grandaj landoj apenaŭ havas interesiĝantojn. Por tiuj servus eldonado de esperantlingva bulteno, ne traktanta aliajn ol pri tiu speciala fako el-laboritajn artikolojn. Per tio ankaŭ — oni povas diri — izolitaj scienculoj povus trovi interrilatojn.

Ĉi tia speciala bulteno en iu nacia lingvo, ekz. germane aŭ angle redaktita, ne estas vivpova, ĉar ne troviĝas sufiĉe da abonantoj. La specialistoj-scienculoj estus pretaj al ofero por subteni esperantlingvan bultenon, des pli, ĉar ili ne

bezonus nacilingvajn ĝeneralfakajn bultenojn.

Kiel estas nun tiu ĉi afero? Artikolo, traktanta tian tre specialan temon, aperas en iu bulteno nacilingva. Izolita scienculo ne povas aboni ĉion tian. Sekve, li ne scias, ke eble iu nekonata samfakulo sin okupadas pri la sama temo, kiel li mem. Ju pli multaj estas la sciencaj eldonaĵoj, des pli estas izolitaj la samfakaj scienculoj.

Ekzemple, mi laboradas super la absoluta geometrio. Multajn jarojn mi oferis por solvi la problemon de l' volumeno de tridimensiaj figuroj, geometriaj korpoj. Tiu solvo aperis jam en la eldono de la Sankta Stefano-Akademio, nature hungarlingve. Nia lando estas tre malgranda. Inter niaj matematikistoj apenaŭ troviĝas, kiuj interesiĝas pri tiu ĉi demando. Mi sciis traduki ĝin en franca lingvo, sed nuntempe pro valutaj malhelpaĵoj mi ne estas abonanto de iu ajn franca, matematika bulteno, al kiu mi povus proponi ĝin aperigi.

Verŝajne mi ne estas sole tiel izolita matematikisto. Eble en iu alia lando troviĝas matematikistoj, kiuj laboradas super mia speciala fako kaj ne povas aperigi siajn rezultatojn tiel, ke mi ekonus tiujn.

Do por la scienculoj la uzo de Esperanto estus granda profito.

Parolante pri tio, konvene mi menciui sciencon verkon esperantlingvan. Ekzemple en mia fako estas menciiebla la verko de *Huntington* (profesoro de la universitato de Harvard, Usono), aperinta kiel serio da artikoloj en « *Annals of Mathematics* » en angla lingvo, kaj traktanta la teorion de transfinitaj grupoj, fonditan de *G. Cantor*. Tiun ĉi verkon esperantigis franca esperantisto *R. Brocard* (eldonis *Gauthiers-Villars*, Parizo 1907) sub la titolo *La Kontinuo*. Esperanto taŭgas do kiel lingvo de la scienco, eĉ en la kazo, kiam la objekto estas tiel abstrakta, kiel la jena. La verko de *Huntington* donas vere profiton al matematikisto, kiu ellernis Esperanton, ĉar ĝi prezentas la nomitan teorion, evoluciigitan ĝis la tempo de la eldono de la libro, tiom precize, kiel — laŭ mia scio — neniu alia verko. Mi kuraĝas rekomendi ĝin al esperantista matematikisto, kiu komencas studadi la cititan teorion. Li trovos la frukton de sia laboro oferita al Esperanto.

*) Vidu en « *Esperanto Internacia* » n-ro 7, julio 1938, paĝo 101.

Angla profesoro pri latina lingvo

Hungara gazeto publikigis la rimarkon de *K.C. Milles*, universitata profesoro en Londono: « El la longa diskutado mi ĉerpis la konvinkon, ke la hodiaŭa kulturhomaro tute ne bezonas la latinan lingvon ». Al la diskuto oni alparolis dum multaj semajnoj. Oni diskutis en kunvenoj kaj en gazetoj, kian elparolon oni instruu en la lernejoj. En kelkaj britaj mezlernejoj oni prononcas la latinan lingvon laŭ la angla elparolmaniero. Do oni diras por « *Virgil* »: « *vörjil* », por « *vidi* »: « *vejdi* » Oni jam ofte diskutis, ĉu tiu prononcado havas ian sencon? Ĉu ne pli efikus tuj studi la tekston en angla lingvo tradukitan el la latina originalo? En la diskuto sub gvido de profesoro *Milles* oni akceptis en Londono jenan vidpunkton:

« a) Inter aŭtoritataj pedagogoj estas preskaŭ unuanima la opinio, ke la bonaj kvalitoj diritaj pri la latinlingva instruado estas nur en la imago. Laŭ la spertoj tute ne estas pruvite, ke la lernantoj de la latina lingvo pensas pli logike kaj pli racie ol aliaj. La senantaŭjuĝa pedagogo jam de longe scias, ke tia pretendo ne havas realan bazon.

b) La lernado de la latina lingvo havas hodiaŭ la celon, ke la amaso, kiu direktas sin al la superaj lernejoj, estu retenita kaj maldensigita. Se tio estas laŭ kelkaj utila servo, laŭ alia vidpunkto ĝi donas gravajn malavantaĝojn. Kiam oni turmentas la infanojn per lernado de la latina lingvo, dum la sama tempo ĝi ne povas lerni iun alian, por la homa klereco nepre necesan studobjekton.

c) La natursciencoj tiom traŝoviĝas nian vivon, ke oni devus nepre pli multe instrui pri ili. Se oni eksigos la latinan lingvon, oni povos plenumi tiun ĉi programon. La natursciencia scio de lerninto de mezlernejo estas surprize malmulta. Oni ne scias ofte la plej elementajn aferojn. Ni estas preskaŭ sur nivelo de la mezepoko, kiam malantaŭ multaj elektitoj malproksime forrestis la grandega amaso.

d) Eĉ la perfekta scio de la latina lingvo ne signifas klercon. Por scii la latinajn kaj grekajn vortojn, kiuj enestas en preskaŭ ĉiuj lingvoj, ne estas necese instrui la klasikajn lingvojn. » —

Profesoro *Milles* ŝatus, ke « post forigo de la latina kadavro » oni oferus pli da tempo por instrui la universalan historion de la homaro. Li celas ne la militirojn, sed la homajn penadojn por pli granda bonstato, interkompreniĝo kaj amo. — Domaĝe, ke li ne aldonis « *Esperanton* ». *P. B. Budapest.*

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 83. 30-an de Junio, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Brazilo.

Belo Horizonte (Minas Gerais). — D: W. Veado, Rua Uberlândia 290, Carlos Prates.

Britujo.

Aberdeen (Skotlando). — D: E. Lentz, 82, Blenheim Place.

Glasgow (Skotlando). — FD. (Komerco): N.H. C. MacPherson, 163, St. Vincent Street, Glasgow C.2.

Leeds (Yorkshire). — FD. (Komerco): H. Blakey, 10, Brudenell View, Leeds 6.

London. — FD. (Maristaj aferoj): G.E. Neal, 111, Hall Lane, London, E.4.
FD. (Ŝip-komerco): I. Alvarez, 80, Bishopsgate, London, E.C.2.

Franco.

Marvėjols (Lozère). — D: F.J. Krüger, Hôtel Randabel, Pont-de-Peyre.

Madagaskaro.

Tananarive. — D: M. Bourgeois, Ambohidahy.

Portugalujo.

Alcobaça (Estremadura). — D: J. da Trindade Ferreira.

Queluz (Estremadura). — D: J.R. Coelho de Amaral, Casal do Canito, Pontepedrinha.

SANĜOJ.

Madeiro.

Funchal. — La antaŭa D., S-ro E.C. Pereira, translokiĝis al Acoroj.
Nova D. en Funchal: M.M. Lourenco de Gouveia, Casa Radio, Rua dos Ferreiros 160.

★

30-a UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 1451 el 28 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 84. 7-an de Julio, 1938.

NOVAJ PATRONOJ:

8. S-ino H.V. Cooper, Bromley, Anglujo.
9. S-ro Noel Wooding, Leicester, Anglujo.
Al ĉi tiuj samideanoj ni ŝuldas sinceran dankon.

NOVAJ DELEGITOJ:

Bulgarujo.

Pleven. — D: G. Jotov, Hotelo «Car Osoboditel».

FD. (Muziko kaj Komerco): La D.

Varna. — FD. (Kemio): D-ro B. Velikov, Str. Pirov 22.

Danujo.

Aarhus. — FD. (Poŝto): H.E. Pedersen, Postkontoret.
FD. (Virinaj aferoj): F-ino G. Riisberg, Söndergade 2.

Jugoslavujo.

Dol. Logatec (Slovenio). — D: B. Brezovsček.

Polujo.

Bielsko. — D: F-ino R. Gerstler, Jaworze 27, ad Bielsko.

Nowy Targ. — D: St. Peksa, Rynek 13.

SANGO.

Ĉeĥoslovakujo.

Zlönice. — D. (Nova adreso): D-ro V. Faigl, Náměstí c. 6.

MONATA STATISTIKO.

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de junio, 1938, kaj ankaŭ, por komparo, ĝis la fino de Junio, 1937:

	Junio, 1938.	Juio, 1937
AM	6205	5903
MJ	1111	964
MA	931	927
MAH	294	238
MS	125	132
PAT.	7	13
DM	73	74
HM	30	31

Sumo: 8776 8282

Korespondajoj.

Centra Oficejo (Sen la gazetoj) dum Junio, 1938:

Ricevitaj	808
Senditaj	2204

3012

30-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, LONDONO, 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 1490 el 28 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

★

INTERNACIA KONKURSO 1938.

Stato je la 30-a de Junio 1938.

	Poentoj		%
	1937	1938	
1. Jugoslavujo	257	659	256.4
2. Bulgarujo	92	201	218.5
3. Svislando	137	283	206.6
4. Polujo	318	571	179.4
5. Finnlando	61	102	167.2
6. Latvujo	55	91	165.5
7. Litovujo	135	159	118.4
8. Aŭstralio	429	414	96.4
9. Belgujo	1722	1628	94.5
10. Norvegujo	792	703	88.8
11. Britujo	6483	5747	88.6
12. Nederlando	2837	2498	87.3
13. Kanado	74	64	86.5
14. Italujo	636	549	86.3
15. Nov-Zelando	265	227	86.0
16. Usono	1513	1277	84.4
17. Portugalujo	317	269	84.1
18. Sud-Ameriko	851	707	82.9
19. Franco	5907	4819	81.6
20. Hungarujo	619	484	78.2
21. Svedujo	3024	2092	69.1
22. Afriko	137	94	68.0
23. Ĉeĥoslovakujo	2449	1568	64.0
24. Danujo	1118	705	63.0
25. Rumanujo	50	27	54.0
26. Aŭstrujo	789	311	38.9
27. Azio	1321	461	34.8
28. Grekujo	137	—	—

32525 26710 % 82.1

Oficiala Informilo

N-ro 85. 14-an de Julio, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Argentino.

Presidencia Roque Saenz Pena (Chaco). — D: M. Brunclik, Casilla de Correo 15.

Tucumán. — D: F. Gonzalez, San Lorenzo 956.

Franco.

Annecy (Haute-Savoie). — D: J. Pignarre, rue du Forum.

Hénin Liétard (Pas-de-Calais). — D: A. Mériaux, 81, rue Jules Ferry.

Lagny (Seine-et-Marne). — D: L. P. Mercier, 5, rue Parmentier.

Valenciennes (Nord). — FD. (Radio): M. Alglave, Blanc-Misseron.

Svedujo.

Klagstorp (Skane). — D: O. N. Ihrborn.

Svisujo.

Bern. — FD. (Komerco): M. Schláfli, Lentulusstraat 53.

Bern. — FD. (Sporto, Studentaj aferoj, Turismo): M. Ardüser, Effingerstr. 67.

Bern. — FD. (Skoltismo): F-ino G. Merz, Falkenweg 9.

SANĜOJ.

Britujo.

Rochester. — D. (nova adreso): F.H. Turner, 1, Union Street.

Hindo-Ĉinujo.

Hanoi. — D. (nova adreso): Nguyen van Nhan, 37, rue Laveran.

Maroko.

(Peranto)

Casablanca. — (Nova adreso): S-ino I. Fink, 5, rue Savorgnan de Brazza.

Svedujo.

Lindesberg. — Pro translokiĝo, provizore ne estas D.

MEMBRO-SUBTENANTO.

126. S-ro J. Martin, Buenos Aires, Argentino.

★

LONDONA KONGRESO.

Ĝis hodiaŭ aliĝis 1520 el 28 landoj.

★

CENTRA OFICEJO.

Bonvolu noti ke dum la kongresa semajno (unua semajno en Aŭgusto) la Centra Oficejo de I.E.L. estos fermita. Oni, do, ne atendu tujan respondon al leteroj, sed ĉiuj komunikaĵoj ricevos atenton post la Kongreso kun minimuma prokrasto.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

UNUEGO

ESTAS FORTO!




Deka listo de Kongresanoj

40. F-ino L. Leach, Ilford, Anglujo.
 41. F-ino L. Regnis, London, Anglujo.
 42. F-ino G. Singers-Bigger, London, Angl.
 44. S-ino D. E. Dyer, London, Anglujo.
 45. F-ino L. Crease, London, Anglujo.
 46. F-ino H. Rintala, London, Anglujo.
 47. J. V. Raffan, Crawley, Anglujo.
 48. D. Mackintosh, London, Anglujo.
 49. L. Swadling, London, Anglujo.
 50. A. Chesnakov, London, Anglujo.
1360. F-ino R. Plomb, Birmingham, Anglujo.
 1361. J. Schooleman, Rotterdam, Nederlando.
 1362. D-ro M. Beltrami, Torino, Italujo.
 1363. Inĝ. M. Bassani, Torino, Italujo.
 1364. A. Beltrami, Torino, Italujo.
 1365. O. Beltrami, Torino, Italujo.
 1366. S-ino F. Beltrami, Torino, Italujo.
 1367. R. Nylin, Hudiksvall, Svedujo.
 1368. F-ino C. Saudin, Rouen, Francujo.
 1369. M. Döbben, Amersfoort, Nederlando.
 1370. F-ino M. Adler, Csuz, Ĉeĥoslovakujo.
 1371. F-ino G. Allen, Middleton Tyas, Angl.
 1372. M. Blum, Csuz, Ĉeĥoslovakujo.
 1373. A. Holmberg, Stockholm, Svedujo.
 1374. F-ino E. Morison, Painswick, Anglujo.
 1375. S. Nilsson, Ektorp, Svedujo.
 1376. S-ino Whale, Mayfield, Anglujo.
 1377. M. Karterud, Trondheim, Norvegujo.
 1378. F-ino E. M. Karterud, Trondheim, Norv.
 1379. F-ino E. M. Baldwin, Ilford, Anglujo.
 1380. F-ino M. Baldwin, Ilford, Anglujo.
 1381. F-ino M. Mattsson, Uddevalla, Sved.
 1382. F-ino L. Mattsson, Uddevalla, Svedujo.
 1383. F-ino V. Andersson, Uddevalla, Sved.
 1384. H. S. Adler, Malmö, Svedujo.
 1385. S-ino T. Lucca, Torino, Italujo.
 1386. S-ino A. Lucca, Torino, Italujo.
 1387. S-ino P. Lucca-Guidi, Torino, Italujo.
 1388. F-ino A. Salaj, Banja Luka, Jugoslavujo.
 1389. F-ino S. Mosicki, Jerusalema, Palestino.
 1390. M. Hyde, Brisbane, Aŭstralio.
 1391. H. F. Van Roye, Sint Andries, Belgujo.
 1392. S-ino M. Van Roye, Sint Andries, Belg.
 1393. F-ino L. Meeuws, Sint Andries, Belgujo.
 1394. E. Mage, Lyon, Francujo.
 1395. S-ino E. Pluchon, Paris, Francujo.
 1396. G. Pluchon, aris, Francujo.
 1397. V. Horsley, London, Anglujo.
 1398. F-ino G.F. Cox, Westcliff-on-Sea, Angl.
 1399. F.O. Lechmere, London, Anglujo.
 1400. F-in oH.H. Wolf, Bussum, Nederlando.
 1401. Rezervita.
 1402. Rezervita.
 1403. F-ino M. Kernas, Gent, Belgujo.
 1404. F-ino E. Lindmark, Uppsala, Svedujo.
 1405. F-ino K. Söderman, Uppsala, Svedujo.
 1406. S-ino A. J. Armleder, Genève, Svislando.
 1407. Rezervita.
 1408. Rezervita.
 1409. S-ino Neary, Dublin, Irlando.
 1410. J.P. Neary, Dublin, Irlando.
 1411. B. Purse, London, Anglujo.
 1412. T. Smith, Glasgow, Skotlando.
 1413. F-ino F.L. Underhill, London, Anglujo.
 1414. F. Rasmusson, Malmö, Svedujo.
 1415. J.H. van der Meer, Den Haag, Nederl.
 1416. S-ino M. Klimaševska, Tauragė, Litovujo
 1417. S-ino S. Romen-Vriens, Rotterdam, Ned.
 1418. F-ino J.H.P. v. Ouwerkerk, Sliedrecht, N.
 1419. F-ino A.M. v. Peere, Dordrecht, Nederl.
 1420. F-ino S. in 't Veld, Dordrecht, Nederl.
1421. F-ino L. den Hollander, Arnhem, Ned.
 1422. H. J. Ebbinge, Roosendaal, Nederl.
 1423. A. Ebbinge, Roosendaal, Nederlando.
 1424. S-ino A. Fagelund, Oslo, Norvegujo.
 1425. H. Ramp, Zürich, Svislando.
 1426. O. Sachse, St. Moritz, Svislando.
 1427. P. Bracegirdle, Eastbourne, Anglujo.
 1428. A. R. Fleming, Rotherham, Anglujo.
 1429. F-ino E. G. Bossen, Oudkarspel, Nederl.
 1430. F-ino D.H. Van Dieren, Winkel, Nederl.
 1431. P. Jeangirard, Paris, Francujo.
 1432. P. Uline, Vienne, Francujo.
 1433. S-ino R. Uline, Vienne, Francujo.
 1434. E. Deligny, St. Omer, Francujo.
 1435. F-ino R. Piponiau, Lyon, Francujo.
 1436. F-ino J. Billiemaz-Cavalier, Lyon, Franc.
 1437. F-ino U. Lebach, Letchworth, Anglujo.
 1438. S-ino G. Smith, Glasgow, Skotlando.
 1439. F-ino J. Smith, Glasgow, Skotlando.
 1440. L. Macke, Arras, Francujo.
 1441. A.J. Turner, Withernsea, Anglujo.
 1442. F-ino G. E. Turner, Withernsea, Angl.
 1443. S-ino E. Lundh, Örebro, Svedujo.
 1444. F-ino S. Bergström, Örnköldsvik, Sved.
 1445. E. Tolnai, Budapest, Hungarujo.
 1446. J. B. West, Margate, Anglujo.
 1447. J. E. Bavin, Wellingborough, Anglujo.
 1448. L. G. Dore, London, Anglujo.
 1449. S-ino Bean, London, Anglujo.
 1450. M. Wiles, Gravesend, Anglujo.
 1451. S-ino F.J. Wiles, Gravesend, Anglujo.
 1452. F-ino M. L. Boucher, Ventura, Usono.
 1453. S-ino M.T. Newman, Los Angeles, Us.
 1454. H. Andrews, Wealdstone, Anglujo.
 1455. P. Ratcliffe, London, Anglujo.
 1456. R. Ridling, London, Anglujo.
 1457. J. de la Mare Rowley, London, Anglujo.
 1458. E. Nokes, London, Anglujo.
 1460. S-ino Epstein, Paris, Francujo.
 1461. H. Epstein, Paris, Francujo.
 1462. V. Ljunggren, Stockholm, Svedujo.
 1463. F-ino E. Holt, Manchester, Anglujo.
 1464. S. Mason, Stockport, Anglujo.
 1465. K. Huyton, Southport, Anglujo.
 1466. F-ino M. Ashworth, Manchester, Angl.
 1467. F-ino E. Pollandova, Praha, Ĉeĥoslov.
 1468. Gvidantino de n-ro 1467.
 1469. F-ino P. Goldman, Kraków, Polujo.
 1470. R. Sakowicz, Mława, Polujo.
 1471. F-ino I. Neumann, Horny-Fedvernek, Ĉ.
1472. S-ino H. Neumann, Hohny-Fedv., Ĉeĥ.
 1473. F-ino D.V. Purvis, London, Anglujo.
 1474. J.M. Baxter, Glasgow, Skotlando.
 1475. C.F. White, Bristol, Anglujo.
 1476. F-ino T. Sörensen, Kristiansand, Norv.
 1477. S-ino Poczubot, Rosny-sous-Bois, Franc.
 1478. V. Poczubot, Rosny-sous-Bois, Francujo.
 1479. S-ino Shipman, Birkenhead, Anglujo.
 1480. A. E. Shipman, Birkenhead, Anglujo.
 1481. H. W. Watson, Oxford, Anglujo.
 1482. S. Aarse Jzn., Amsterdam, Nederlando.
 1483. S-ino J.C. Aarse-v. d. Graaf, A'dam, N.
 1484. S. Aarse Szn., Amsterdam, Nederlando.
 1485. J.H. Dey, Rotterdam, Nederlando.
 1486. F-ino C.J.M. Hagen, Rotterdam, Ned.
 1487. F-ino E.J. Thissen, Bergen-op-Zoom, N.
 1488. L. Noreika, Siauliai, Litovujo.
 1489. F-ino H. Cubise, Keighley, Anglujo.
 1490. F-ino I. H. Niven, Manchester, Angl.
 1491. S-ino J. Howard, London, Anglujo.
 1492. H.E. Eckerberg, Aneby, Svedujo.
 1493. N. Sigurd, Falköping, Svedujo.
 1494. E. Karlsson, Växjö, Svedujo.
 1495. N. Andersson, Växjö, Svedujo.
 1496. E. Österberg, Härnösand, Svedujo.
 1497. F-ino B. White, London, Anglujo.
 1498. F-ino R. Le Feuvre, Strood, Anglujo.
 1499. L. Shinn, Ilford, Anglujo.
 1500. D-ro H. Buchli, Bern, Svislando.
 1501. F-ino E. Leland, Brooklyn, Usono.
 1502. G. Neal, London, Anglujo.
 1503. F-ino E. M. Stewart, London, Anglujo.
 1504. S-ino J.B. Primmer, Cwdenbeath, Angl.
 1505. F-ino C.J.M. Nieuwenhuijsen, R'dam, N.
 1506. F-ino M.C.J. Nieuwenhuijsen, R'dam, N.
 1507. G. Lewis, London, Anglujo.
 1508. F-ino E. M. Butt, Southport, Anglujo.
 1509. S-ino A. L. Blacklock, Ipswich, Anglujo.

Laŭlanda Statistika de la Aliĝintoj:

Anglujo, 867; Aŭstralio, 3; Aŭstrujo, 3; Belgujo, 47; Brazilo, 3; Ĉeĥoslovakujo, 25; Danujo, 10; Egiptujo, 3; Finnlando, 6; Francujo, 111; Germanujo, 10; Hispanujo, 2; Hungarujo, 3; Irlando, 6; Italujo, 22; Jugoslavujo, 2; Kanado, 4; Kimrujo, 10; Litovujo, 4; Nederlando, 92; Norvegujo, 30; Palestino, 1; Polujo, 30; Rumanujo, 1; Skotlando, 71; Svedujo, 114; Svislando, 9; Usono, 20.

Entute 1509 el 28 landoj.



Wranka

Ernfrid Malmgren ĵetas sian lazon, kaptonte novajn esperantistojn.

Okaze de la 30-a Universala Kongreso de Esperanto en Londono, s-ano E. Malmgren prezentos novan planon de propagando, kiu permesos al la samideanaro tutmonda, plej sukcese kapti por Esperanto sensuspektajn civitanojn. Ĉe tio li publike demonstros sian unikan kaj nepre efikan metodon.

Ankorau kelkaj raportoj pri naciaj Esperanto-kongresoj

12-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso

(Pécs, 4-6 junio 1938.)

Floroj kaj hungaraj gastamaj koroj atendis kaj salutis la gekongresanojn jam ĉe la stacidomo. Preskaŭ ĉiu landa societo sendis reprezentanton. Sabatvespere post fakkunsidoj estis agraba interkonatiga vespero kun esperantlingvaj prezentadoj.

La solena kunsido de la kongreso okazis dimanĉe en la urbodomo, kie ĉeestis ankaŭ la vicurbestro D-ro Lajos Esztergár kiu faris belan salutparoladon en la nomo de la urbo Pécs.

J. Mihalik, afergvid. prezidanto, malfermante la kunsidon, parolis pri « Esperanto kaj Nacianismo ». Li pruvis, ke Esperanto kaj patriotismo estas bone konformigeblaj kaj ke la Esperanto-movado nur tiel havas rajton por vivi, se ĝi staras sur nacia fundamento.

Post la parolado de J. Mihalik la delegitoj de diversaj societoj kaj landoj salutis la kongreson, en la nomo de IEL mi diris salutvortojn kaj prezentis la raporton de ĉefdel. P. Balkányi. Post la salutoj oni decidis pli efike kaj energie fari ĉion eblan por enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj ankaŭ agadi ĉe la hungara Radio, kie ĝis nun oni ne atingis ian rezulton.

D-ro F. Erdy anoncis ke la Eŭkaristia Esperanto-mondkunveno telegrafe salutis la Papon, kiu telegrafe sendis sian apostolan benon por la tuta Esperanto-movado. En kadro de la solena kunveno estis transdonata la « migranta premio » de la Hungara Skolta Asocio, kiun gajnis la Pécs-a « Pius » esp. skoltgrupo en esp. lingva konkurso. Oni faris kelkajn ekskursojn kaj okazis publika soleno ĉe la landa flago.

Generale oni konstatis, ke en Hungarujo la Esperantomovado havas ĝustan direkton sub bona gvidado. Margareto de Szabó.

Jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo

dum pentekosto en Oslo.

Ĉeestis reprezentantoj de sep kluboj ekster Oslo, kaj entute partoprenis 70 personoj.

En la jarkunveno, post la kutimaj salutoj, la propagandestro de NEL, s-ro A. Jansson, prelegis pri la bazo de la propaganda laboro. Li ĉefe akcentis la gravecon de plej alta kvalito en la movado, koncerne la lingvon kaj la labormetodojn. Li ankaŭ skizis kiel labori pri nedeviga Esperanto-instruado en la lernejoj. Sekvis diversaj diskutoj, i.a. pri fondo de fakaj sekcioj, precipe instruista, pri speciala organizaĵo por pritrakti turismon. Elektiĝis la jena estraro (plejparte reelektaj): prez. kapitano Bugge-Paulsen; vicprez. Arnfinn Jansson, ĝen. sekr. C. St.-Bowitz; sekr. Olav Rygg; kas. f-ino Else Wahl; estraranoj: Gustav Johannessen en Hamar, Ragnvald Rian en Trondheim, kaj Alfred Eriksen en Narvik. Redaktorino de « Esperantobladet » restis f-ino Liv Sandberg.

La ĝenerala kunveno, kiu estis fruktodona kaj kies ĉiuj diskutoj okazis en plej samideana spirito, okupis du tagojn: la 5-an kaj 6-an de junio; la 5-an, posttagmeze, okazis **radio-el-sendo**, en norvega lingvo kaj en Esperanto. La 5-an, vespere, okazis granda festo, kun bonega manĝo, interesa programo kaj dancado. Ĉe la tablara oni faris multajn paroladojn, la reprezentantoj de la diversaj kluboj transdonis salutojn, kaj oni laŭtlegis alvenintajn leterojn kaj telegramojn el la tuta lando kaj eksterlandoj. (Laŭ raporto de Aj.)

Sveda Esperanto-Federacio jarkunvenis pentekoste en Arboga.

Ĉeestis pli ol cent kongresanoj, inter kiuj estis delegitoj de 21 lokaj grupoj. La **solena malfermo** okazis sabatvespere; la urbo estis reprezentita de sia urbestro kun edzino kaj de la Prezidanto kaj vicprezidanto de l' urba estraro. Post la vespermanĝo kelkaj samideanoj el Örebro prezentis malgrandan teatraĵon « Spiritismo »; fine dancado.

Pentekostan dimanĉon okazis **kunveno kun traktadoj kaj diskutoj** en la urbodomo, ĝi daŭris de la deka ĝis vespere, kun du-hora manĝopaŭzo. El la jarraporto evidentiĝis ke la membronombro de SEF dum 1937 estis 2616 en 114 grupoj, kaj 235 individuaj membroj; 164 samideanoj estis aktivaj membroj de IEL, certe tre malmulte. S-ro Fejde el Nässjö raportis pri la gazet-kurso prizorgita de li (Vidu malsupre!) Poste oni diskutis pri Esperanto en sveda Radio kaj reelektis la estraron. Sekvis pluaj diskutoj, ekz. pri la propono dungi vojaĝantan sindikon por la federacio (por propagando, kursgvidado, librovendado ktp.) kaj starigi garantian fondadon de 2-3000 kronoj jare, dum tri jaroj.

Vespere oni kolektiĝis en eksterurba restoracio Vindbäcken, kie oni prenis te-manĝon kaj kunestadis en gaja kaj harmonia atmosfero.

Lundon okazis jarkunveno de Eldona Societo Esperanto kaj diskuta kunveno de Sveda Esperanto-Instituto.



Specialan atenton meritas la **gazet-kurso** de s-ro Fejde, kiu aperis ĝis nun en pli ol cent gazetoj en Svedujo. Daŭriga artikolo pri Esperanto, verkita de s-ro Hjalmar Kihlberg, estas vendita al 25 svedaj gazetoj. Per interkonsento kun la respektivaj gazetoj oni nun havas entute **bonhavan por anoj de 1500-2000 kronoj**. S-ro Fejde esprimis la esperon, ke antaŭ la fino de la jaro li sukcesos atingi bonhavan de 4000 kronoj. S-ro Malmgren esprimis la dezirindecon de ia daŭriga legaĵo, ia felietono, en tiuj gazetoj kiuj aperigis la kurson.

Somera Tendaro apud Antverpeno

Post la 30-a Universala Kongreso, aranĝos IPE apud Antverpeno en Belgujo sur bordo de rivero Schelde Someran Tendaron (14-20 aŭgusto). La kosto por aliĝo, manĝoj, dormloko en tendoj, kaj ekskursoj (fakte por ĉio bezonata) estas nur 200 belgaj frankoj; senlaboruloj aŭ dua persono en unu familio pagas nur 150 fk.

La kampejo estas granda sabla tereno, tre agrabla dum la somero. Proksime troviĝas vasta amuza foiro. Oni povas sin bani en la akvo aŭ ripozi en la suno. Oni ricevos ĉiutage unu varman tagmanĝon, krom la ceteraj manĝaĵoj. Kiu ne deziras loĝi en tendoj, povos loĝi en hotelo por aldona pago de 10 fk. por ĉiu nokto. En la tendaro estas dormsako, kuiriloj, tendoj; partoprenantoj tamen devos kunporti litkovrilojn, lantukojn, manĝilaron, sapon kaj — la verdan stelon!

Aliĝojn sendu kiel eble plej baldaŭ al la organiza sekretario: J. Beeckmans, Damplein 8, Antwerpen, Belgujo.

Ĉiam portu la Verdian Stelon!

Esperanta disaŭdigo el Brno (El gazeto « Radiojournal », jarkolekto XVI, n-ro 25.)

Nia Brna kunlaboranto parolis kun ĉefo de literatura fako Dalibor Chalupa pri la Esperantaj programoj, kiujn disaŭdigas Brno kaj kiujn aŭskultadas ĉiuj esperantistoj — anoj de internacia movado — kun kreskanta intereso. La interparolo konsistis el demandoj kaj respondoj. Sekvu kun ni iliajn enhavojn:

Kiam vi ekhavis ideon disaŭdigi esperante ?

Se mi ne rigardas la esperantajn kursojn kiuj aperis antaŭ dek jaroj en ĉiuj niaj stacioj, estis en jaro 1931, kiam je la okazo de « Napoleona ekspozicio » en Slavkov-Austerlitz estis disaŭdigita en Brna stacio propaganda parolado. Kiu havis bonegan sukceson en fremdlando. En la sekvinta jaro envicigis la Brna stacio Esperantan paroladon pri la IX-a Sokola Olimpiado, kaj malgraŭ tio, ke ĝi estis ree disaŭdigita nur de Brno, do per sufiĉe malforta energiaĵo kaj en la tempo, kiu ne estis tro taŭga por eksterlandaj aŭskultantoj, ni ricevis post la parolado 42 leterojn el diversaj eŭropaj ŝtatoj, entenantajn petojn je informoj pri la sokola festo. — Tio meritis pripenson. En tiu ĉi okazo estis pruvita la propaganda valoro de Esperanto, sed samtempe estis ekkonita ĝojiga fakto, ke per unu lingvo estis samtempe bone informitaj anoj de diversaj nacioj. Tiam estis decidite: esperantan disaŭdigon ni daŭrigos.

Maje 1932 oni komencis disaŭdigon de ĉiusemajnaj propagandaj prelegoj, kiuj estis de tempo al tempo anstataŭigitaj per prelegoj pri kulturaj temoj, aŭ per legado de tradukoj el ĉeĥa literaturo, kaj kiam ni fine de la jaro rigardis la rezulton de tiu ĉi eksperimento kaj pripensis ĝin, ni konstatis laŭ la intereso de eksterlandaj aŭskultantoj pri Ĉeĥoslovakio, ke la laboro ne estis vana kaj ke ni jam ne povas lasi ĝin.

Ĉu aperis iuj malhelpaĵoj aŭ problemoj ?

Ĝis tiu tempo ankoraŭ ne estis tiom da malhelpaĵoj. Kio koncernas interpretadon, tiun prizorgis Brnaj esperantistoj, kiuj kun entuziasmo, kutima al esperantistoj, tradukis kaj legis prelegojn kaj prizorgadis taŭgajn tradukojn el ĉeĥa literaturo, jam prese eldonita. — Ni timis nur, ke en estonteco oni devos solvi problemojn ne nur lingvajn, interpretistajn, sed ankaŭ programajn. — Tion ni sentis bone kaj klare. Ne estas eble, plu resti ĉe nuraj prelegoj, ĉar parolata vorto en diversaj formoj estas pli interesa, kaj finfine, eble, ni povos poste disaŭdigi esperante ĉiujn programojn, kiuj estas disaŭditaj per naciaj lingvoj. Kun tiu ĉi ideo malfermiĝis vastega horizonto, kies finon ni tiam ankoraŭ ne vidis. Radioludo, muntaĵo, opereto, opero, melodramo, aŭ reportaĵo, kiom da formoj, kiom da eblecoj, uzi Esperanton por interpretado de niaj artaĵoj kaj konatiĝi ilin al la tuta mondo, parolanta per tiom da diversaj lingvoj, do interligi sin kun multaj nekonataj fremdaj aŭskultantoj per nura unu lingvo.

Taŭgaj aĵoj kaj tradukantoj ne mankis, sed pri la aktoroj ni nur revis. Tiel okazis unua disaŭdigo de longa Esperanta programo. Ĝi daŭris unu horon, kaj ĝiaj programoj estis, krom unuakta komedio de Ignát Herrmann: « Pentristo kaj fiakristo », recitado, kantoj kaj dialogoj. Ĝi okazis la 1-an de marto 1933. Dum tiu ĉi jaro estis disaŭditaj ankoraŭ sep Esperanto-horetoj, kun parolata vorto recitata dramoj, kantoj kaj muziko, kaj tiuj ĉi programoj estis jam relasataj de Praha I kaj Moravská Ostrava. Tiel plivastiĝis la publiko, sed ankaŭ pligrandiĝis la respondeco.

Vi diris, ke estis disaŭditaj ankaŭ teatraĵoj. Kiuj ludis ?

Nur komence ludis esperantistoj-amatoroj, sed ĉe tiuj provoj ni pli kaj pli ekkonis, ke estas necese gajni interpretistojn-artistojn. Tiel estis fondata grupo de aktoroj (anoj de Brna landa

Esperanto vivas tra la Mondo

Esperanto kiel lingvo diplomatia.

Al letero, direktita de Esperanto-komitato en Polujo al la Registaro de Manĉukŭo en lingvo franca, konsiderante ke ĝi estas la lingvo de la diplomatio, la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj de tiu ŝtato respondis en la internacia lingvo Esperanto. — Ankaŭ la brazila Ministerio de Trafiko respondis al franclingva letero de la sama komitato en Esperanto.

Brita poŝtadministracio presigis broŝuron en Esperanto.

La brita poŝtadministracio ĵus eldonis 8-paĝan broŝuron en la internacia lingvo Esperanto. La broŝuro enhavas utilajn informojn pri britaj poŝtaj servoj, tarifoj ktp. Ĝi reprezentas la unuan gravan uzon de Esperanto fare de la brita ŝtato.

Esperanto-tabuloj nun ankaŭ en francaj stacidomoj.

Vojaĝante en Nederlando, oni trovas en ĉiu iom grava loko, elirante el la stacidomo, tabulon kun adreso de Esperanto-konsulo, al kiu la vojaĝanta publiko Esperanto-parolanta povas sin turni por diversspeca helpo, informoj, gvidado ktp. Ankaŭ nombro da finlandaj stacidomoj surhavas Esperanto-tabulojn. Nun oni enkondukis tiun praktikan aranĝon ankaŭ en Francujo, provizore en du stacidomoj de la grava havenurbo Dunkerque, sed aliaj certe baldaŭ sekvos.

Ankaŭ francaj poŝtĝicetoj elpendigas Esperanto-afiŝojn.

Laŭ informo en la Oficiala Bulteno de la franca PTT-Administracio, la poŝtstoj rajtas pendigi ĉe la ĝicetoj afiŝon pri la uzado de Esperanto, dum la horoj kiam deĵoras esperant-

ista oficisto. Precipe ankaŭ en la Ĉefa Poŝtejo de Parizo, Esperanto-scianta publiko povas esti servata ĉiutage de 9-12, kaj kutime ankaŭ posttagmeze de 15-18 h.

Esperanto en la plej grava elektroteknika vortaro.

Okaze de la lasta jarkunveno de I.E.C. (Internacia Elektroteknika Komisiono) en Torquay (Anglujo) pretiĝis vortaro, kiu signifas la rezulton de pli ol tridek-jara internacia kunlaborado. Tiu grandformata kaj ampleksa elektroteknika vortaro estas ordigita ne laŭ la alfabeto, sed laŭ parenceco de la nocioj (fakterminoj), t.e. laŭ la decimala klasifiko. La nocioj estas en la lingvoj franca, angla, germana, itala, hispana kaj Esperanto. La klarigoj de la nocioj estas faritaj en la lingvoj franca kaj angla. La vortaro reprezentas la plej gravan internacian elektroteknikan terminaron ĝis nun aperintan, kaj ĝi sendube kontribuos multe al la dezirinda normigado de la fakterminoj sur la elektroteknika kampo.

Ĉeĥoslovaka presoficejo radiosendas en Esperanto.

Komencante kun julio, la ĉeĥoslovaka presoficejo ĉiun lundan vesperon disaŭdigas siajn informojn (politikajn, turismajn ktp.) en Esperanto. Ĉeĥoslovakio sekvas per tio la ekzemplon de la itala Radio, kiu jam delonge uzas Esperanton por la disaŭdigo de politikaj kaj, tute precipe, de turismaj informoj.

Esperanto oficiale uzata ĉe la hungara poŝto.

Okaze de la Eŭkaristia Kongreso la hungara poŝto enkondukis novaĵon: ĉe gravaj kongresoj en Budapeŝto oni povas nun, en la lingvoj angla, franca, germana, itala, hungara kaj en Esper-

anto, sendi sciigon per telefono al certa persono kiu, se li anoncis sin ĉe la stacio « Telefon-restante », poste povas aŭdi la sciigon por li destinitan.

121 francaj deputitoj apogas Esperanton.

En Francujo ekzistas Esperantista Parlamenta Grupo, al kiu aliĝis jam 121 deputitoj diverspartiaj. Ĝenerale, en Francujo la intereso por la internacia lingvo neniam de post la mondmilito estis tiel vigla kiel nun.

Esperanto en hungara universitato.

En la tri unuaj semajnoj de aŭgusto okazos en la « Universitato por la Sciencoj » en Debrecen (Hungarujo) prelegoj en ses lingvoj pri moderna literaturo, historio, pedagogio, filozofio kaj natursciencoj. La lingvolecionoj ebligas lernadon de la lingvoj franca, angla, germana, itala, kaj Esperanto.

Sudafrika sendstacio enkondukis Esperanto-prelegojn.

La sudafrika stacio Johannesburg sendis fine de julio interesan paroladon pri « Esperanto kiel lingvo por la estonteco ». La sama stacio akceptis en sian programon la dissendon de ok Esperanto-prelegoj dum oktobro kaj novembro nunjaraj.

Aŭstralia Senatano Abbott fondis Movadon por Internacia Interkompreno.

Sub prezido de la aŭstralia eks-ĉefministro Scullin okazis inaŭgura kunveno de la « Fellowship of International Understanding », fondita de Senatano Macartney Abbott. Al tiu « Movado por Internacia Interkompreno » jam aliĝis membroj de ĉiuj aŭstraliaj partioj. Senatano Abbott celas la enkondukon de komuna lingvo por ĉiuj homoj, apud la respektivaj gepatraj lingvoj. Kvankam li ne speciale propagandas Esperanton, tamen lia celado koincidas kun la celoj de l' esperantistoj.

Brazila filateliekspozicio « BRAPEX » uzas Esperanton.

Same kiel la broŝuro por la filateliekspozicio « Praga 1938 » enhavis Esperanto-parton, same ankaŭ la Unua Internacia Filateliekspozicio en Rio-de-Janeiro, kiu okazos sub la nomo « BRAPEX », eldonis sian bele ilustritan invitbroŝuron en kvin naciaj lingvoj (portugala, hispana, franca, angla, germana) kaj en Esperanto.

teatro), kiuj en privata lingva kurso havigis al si bonan prononcadon kaj pli poste ankaŭ konon de Esperanto. Hodiaŭ estas la nomo « Trakt » (tiel nomiĝas nia Esperanto-ensemblo), kiu signifas « Teatro- kaj Radio-Aktoroj » konata en la tuta esperantista Eŭropo, eĉ transmare, kaj esperantistoj de ĉiuj nacioj alte taksas la lingvan nivelon de ĝiaj anoj, kiu estas ofte taksata kiel modelo. Al TRAKT poste aliĝis kelkaj kantistoj-solistoj kaj miksitaj ĥoro, kaj nun ni povas diri, ke ni en Ĉeĥoslovakio havas unuan Esperantan teatron, kiu kapablas ludi kiun ajn teatro- aŭ radioformon.

Kion ĉion vi jam disaŭdigis ?

Dum tiuj jaroj estis disaŭdigita jam granda kvanto — pli ol 100 programoj. Dramoj kaj radioludoj (inter aŭtoroj estis Karel Capek, Frantisek Langer kaj Jirí Mahen), muntaĵoj, operetoj (Oskar Nedbal: Pola sango kaj Jaromír Weinberger: Sur rozoj sternite), operoj (Bedrich Smetana: Vendita fianĉino kaj Kiso) kaj melodramo (Erben-Fibich: Kristnaska tago). Krom tio estis disaŭdigitaj prelegaj cikloj, en kiuj niaj eminentaj personoj de scienca kaj artistika movado parolis pri nia kulturo. Ni rememorigas la ciklon « Kion donis Ĉeĥoslovakio al la mondo », kiu havis en eksterlando grandan eĥon. Estis disaŭdigitaj nur niaj aŭtoroj, kaj estis necese krom valoraj artaĵoj disaŭdigi ankaŭ programojn tute distrajn kaj tiujn, kiuj propagandis nian ŝtaton kaj ĝian demokratian ideon.

Kaj kiel reagis la aŭskultantoj en la mondo ?

Tio ĉi estas tre ĝojiga ĉapitro. Mi dezirus al ĉiu trarigardi post ĉiu disaŭdigo centojn da

leteroj kaj kartoj, surhavantaj poŝtmarkojn kun bildoj de piramidoj kaj alkaroj, tiujn interesajn skribmanierojn, kiuj karakterizas la diversajn popolojn, sed ĉefe tralegi tiujn partojn, en kiuj anoj de ĉiuj eŭropaj nacioj taksas nian laboron. Oni povus kontraŭdiri, ke temas pri Esperanta fanatikeco kaj ke ne ekzistas multaj esperantistoj, sed la enhavo de tiuj ĉi leteroj vidigas ion alian: tiuj universitataj kaj mezlernejaj profesoroj, instruistoj, ĵuristoj, advokatoj, oficistoj, komercistoj, laboristoj, kamparanoj de ĉiuj nacioj eŭropaj, aŭskultantaj niajn disaŭdigojn, havas grandan aron da konatoj-neesperantistoj, al kiuj ili sciigas kion ili el Ĉeĥoslovakio kaj pri Ĉeĥoslovakio ekkonis. Milojn da leteroj, kiujn ni de la jaro 1931 ricevis, konvinkis nin, ke en la mondo multaj homoj simpatias kun nia ŝtato. Eble ni havos iam okazon montri al niaj aŭskultantoj-neesperantistoj tiun grandan korespondadon, kiu estas zorge registrata kaj en tradukoj post ĉiu disaŭdigo enmetata en muzeon de Praha. Brno fariĝis « Radio-Mekko » de esperantistoj. Ili donis al ĝi la nomon « Verda stacio » laŭ la verda stelo, simbolo de esperantistoj. Brno efektive unufoje en internacia lingvo operon kaj opereton.

Kiujn novaĵojn vi preparas ?

Ni volas provi per mallongaj ondoj unufoje monate disaŭdigi Esperanton por Ameriko. Sekvontan sezonon ni malfermos la 3-an de oktobro per « Najado » de Dvorák.

Ĉeĥe verkis Bedrich Vokatý.

Esperanten tradukis L.B., L. Bělohrad, ĈSR

Ni funebras

— S-ro C. QUIRINO DE OLIVEIRA, unu el la plej sindonemaj brazilaj veteranoj de nia movado, mortis la 19.5. en Rio de Janeiro. Li estis kunfondinto de Brazila Klubo Esperanto (1906) kaj de Brazila Ligo Esperantista kaj dum kelkaj jaroj okupis la oficon de delegito de UEA en Rio. Li komponis multajn muzikaĵojn kun teksto en Esperanto, kiuj estis sukcese ludataj dum ĉiuj brazilaj kongresoj de Esperanto kaj ankaŭ en Washington, okaze de la 6-a Unversala Kongreso, kiun li ĉeestis. Li eldonis du el siaj muzikaĵoj, kies preskaŭ ĉiujn ekzemplerojn li dediĉis al Brazila Ligo Esperantista. — Al lia familio niajn kondolencojn!

Kiel taksi la valoron de Esperanto?

Kiel oni povas taksi la valoron de Esperanto kompare al la valoro de la naciaj lingvoj?

Tio estas iom malfacila demando, sed per komparaj metodoj oni povas prezenti al la demandanto ian mezuron, per kiu fari juĝon pri la rezultoj de nia 50-jara laborado. (Mi diras « nia 50-jara », kvankam mi estas esperantisto nur dujaraĝa.)

Se anglo vojaĝas en fremda lando, li en multaj lokoj renkontas iun kiu parolas lian lingvon. Same ĉe la germanoj, aŭ la francoj. Sed se esperantisto vojaĝas, li devas serĉi siajn samlingvanojn. Oni ĝis nun tre malofte vidis butikon, sur kies montrofenestro troviĝas la vortoj: « Oni parolas Esperanton ». Sed estas tute alie rilate la anglan, francan, aŭ germanan lingvon. Oni ofte vidas pri ili tian avizon. Pro ĉi tio ni povas diri, ke Esperanto ne estas tiom valora en la praktika vivo, kiom la angla ktp. lingvoj, en la nuna mondo.

Sed kontraŭe, se dano, ĉeĥo, bulgaro, japano, turko, aŭ kroato vojaĝas, povante paroli sole la propran lingvon (en kelkaj landoj, eĉ se la vojaĝo okazas inter la limoj de tiu lando), ili devos serĉi, serĉadi iun, kun kiu ili povos paroli. Tiaj lingvoj — kaj mi menciis nur malmultajn — ne estas multe uzataj ekster la nacioj, al kiuj ili apartenas. Tial Esperanto estas multe pli valora ol iu el tiuj lingvoj.

Oni povus fari plenan liston de lingvoj — aŭ almenaŭ liston de la lingvoj malmulte uzataj ekster la propra teritorio —, ekz. ĉina, sveda, flandra, norvega, hungara, afrikana, ktp., eble eĉ pola, hebrea, egipta kaj aliaj povus esti en la listo, kaj oni trovus, ke Esperanto havas super ĉiu el ili avantaĝon. Pensu pri la litovo kiu scias du lingvojn, la litovan kaj Esperanton; ĉu li trovos personon kiu povas paroli al li en la litova lingvo pli frue ol esperantiston? Ne, eceptante hazardon.

Do la valoro de Esperanto en fremda lando estas ie inter la valoroj de la grandaj lingvoj kaj la valoroj de la malgrandaj, kaj ĝi egalas al kelkaj aliaj lingvoj.

Se listo de lingvoj estus farata, kun poentoj apud ĉiu lingvo por montri ĝian eksterhejman valoron, eble oni povus same juĝi pri la valoro de Esperanto kaj doni al ĝi poentojn.

Sed povas esti, ke Esperanto valoras pli ol du aŭ tri aŭ eĉ dek el la malgrandaj lingvoj kune. Ekzemple, la kroata, araba, latva, kaj estona lingvoj ĉiuj kune valoras malpli ol Esperanto en multaj landoj.

TAMEN! Klarigante ĉi tiun komparon al varbato, ne forgesu emfazi, ke Esperanto estas organizita en tia maniero, ke

ĝia valoro pli ol duobliĝas.

Alian mezurilon povas provizi la radia konkurso de la Itala Radio. Pasintjare per la angla lingvo partoprenis nur 63 personoj, dum per Esperanto partoprenis 101. Sed ĉar verŝajne pli ol 50 % de la konkursintoj per la angla lingvo loĝas en Anglujo, tio lasas proksimume 30 anglolingvajn partoprenintojn en la cetero de la mondo.

Sed ni memoru, ke la plej bona maniero pligrandigi la valoron de Esperanto estas PLIGRANDIGI LA NOMBRON DA UZANTOJ. (Pardonu min, kara leganto, kiam vi lastfoje varbis novan esperantiston? Ne atendu tro longe, mi petas!)

Vilĉjo Verda.

Ĉu en Esperanto ekzistas dialektoj?

Ĉiujn el vi certe jam demandis neesperantisto, ĉu Esperanto ne havas dialektojn. Komprenoble vi energie neis; kaj se la « laiko » dubis, vi eble rakontis al li, ke en la Internaciaj Kongresoj la anoj de tiom kaj tiom da malsamaj lingvoj eĉ ne povis diveni la respektivan gepatran lingvon.

Nu, tamen ankaŭ en Esperanto ekzistas dialektoj

Ni komparu la situacion al tiu de la naciaj lingvoj.

Estas interese, ke nacilingve oni faras diferencon inter « dialektoj » kaj « akcentoj ». La malsamaj de elparolo ĉe la anoj de sama lingvo estas nomataj dialektoj, kaj oni diras, ke fremdlingvano havas « fremdan akcenton ». Tiu diferencigo estas malĝusta: Kimro parolas kun kimra « akcento », tute egale, ĉu li parolas sian hejman dialekton, la anglan aŭ kiun ajn fremdan lingvon. En Esperanto la vorto « akcento » cetere ne havas tiun signifon.

En la diversaj naciaj lingvoj ja tute ne ekzistas unueca elparolo. La loĝantoj kaj loĝintoj de malsamaj landpartoj — ankaŭ de diversaj urboj kaj eĉ de malsamaj partoj de sama granda urbo — parolas malsamajn dialektojn. Kaj tiuj, kiuj elkreskis en la lando de sia gepatra lingvo, ĝenerale aŭdas ekzakte, el kiu parto de la lando venas samlandano, kiun ili aŭdas paroli.

Sed tiun kapablon oni ĝenerale havas nur pri sia « propra » lando. Tial la naciaj lingvoj faras la diferencigon inter « dialekto », kiu difinas malgrandan parton de la propra lando, kiun la orelo povas distingi, kaj « akcento » por tuta fremda lingvoteritorio, en kiu oni ne

povas aŭdi diferencon de elparolo.

Antaŭ kelkaj jaroj mi estis en Hago kaj iutage estis en Scheveningen kun nun morta s-anino f-ino de Lange, kiu bonege parolis la germanan lingvon. Ni estis sur la marponto, je kies ekstremaĵo estas kazino. Jen el la kazino elvenis paro parolanta germane.

« Ĉu vi komprenis, kion ili diris? » mi demandis f-inon de Lange.

« Ho, jes! » ŝi respondis.

« Kaj ĉu vi aŭdis, el kiu lando ili estas? »

« Komprenoble », respondis f-ino de Lange, « el Germanujo ».

Sed mi devis klarigi al ŝi, ke ŝi estis malprava: la paro estis aŭstra, kaj kvankam tio aŭdiĝis — por mi — tute klare pro la dialekto, f-ino de Lange ne estis aŭdinta la diferencon.

Kelkajn tagojn poste okazis io tute simila, kvankam mala: Ni renkontis du knabinojn pitoreske vestitajn. F-ino de Lange kaj du aliaj holandaj sinjorinoj alparolis ilin, kaj mi aŭskultis, bone komprenante, la interparoladon. Kiam la knabinoj estis foririntaj, miaj akompanantinoj diris al mi:

« Jen vi havis okazon aŭdi dialekton tute malsaman de la nia. Ĉu vi povis iom kompreni la du knabinojn? »

Kaj mi devis konfesi, ke mi komprenis la du knabinojn same bone kiel la Haganojn kaj tute ne aŭdis diferencon.

Same kiel aŭstroj parolas alian germanan dialekton ol prusoj, kaj tiuj du knabinoj elparolis la holandan lingvon alie ol Haganoj, ankaŭ franco parolas alian dialekton de Esperanto ol polo. Sed por ĉiuj el ni Esperanto estas dua lingvo, do fremda lingvo, kaj tial nur malmultaj el ni — tiuj, kiuj « vivas en Esperantujo » dum tre longaj jaroj kaj havas tre delikatan oreton — aŭdas la diferencon. Por ĉiuj aliaj neniom da diferenco estas aŭdebla, kaj por ili « ne ekzistas dialektoj » en Esperanto.

Tamen, Esperanto ne disfalas en dialektojn. Ankaŭ la franca, germana aŭ angla lingvoj ne « disfalas » en dialektojn. Nordgermano komprenas aŭstron, kiu parolas germane, ne iun dialekton; kaj kvankam la angla de Anglujo diferencas de tiu de Usono, anglo kaj usonano interkompreniĝas bone, ĉar ili — malgraŭ la malsameco de la « akcento » — parolas la saman lingvon.

Charles Minor, L.K.

La kontraŭuloj asertas

ke internacia lingvo, se ĝenerale enkondukite, iom post iom forpuŝus la naciajn lingvojn. Sed tiel longe, kiel ekzistados nacioj, certe ekzistados ankaŭ iliaj naciaj lingvoj. Cetere, la naciaj lingvoj, siaflanke, ne sukcesis forpuŝi la dialektojn.

La Esperanto-Literaturo kreskas

Henrik Seppik: La tuta Esperanto. Gramatiko por progresintoj — Gvidilo por kursestroj. — Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝto, 1938. — Formato 13,5 x 20 cm. — 184 paĝoj dense kompostitaj. — Havebla ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando. (Prezo gld. 1.60.)

Konsiderante la egan gravecon, kiun ĉiuj speciaj lerniloj havas por nia lingva kaj movada evoluo, oni devas apliki iom alian mezuron ĉe ilia recenziado ol ĉe recenzo de nuraj kaj puraj literaturaĵoj. Ĉi-lastaj malofte atingas tiel vastan disvastigon, kian ĉe ordinaraj instru-verkoj oni povas konstati. Bonaj lernolibroj decide influas tutan generacion da esperantistoj en bona senco, t.e. ili kreas firman kaj sekuran lingvan fundamenton ĉe la lernantoj, kiuj sur ĝia bazo poste povas formi al si propran kaj memstaran kriterion pri la lingva — ne arta! — valoro de legita verko.

Estis iam tempo, kiam svarmis en nia verda mondo novaj lernolibroj, speciale por komencantoj. Komprenibile estis multa ventumaĵo inter la greno, kaj la recenziantoj, kiuj ne volis tro ĉagreni la diversajn certe ĉiam bonintencajn aŭtorojn, devis lerte substreki la laŭdindajn flankojn (kelkfoje nur pene troveblajn), por ne tute malaprobi tiun aŭ tiun verketon. Nu, dum la pasado de la jaroj pli kaj pli elŝeligis tiu formo, kiu en ĝeneralaj trajtoj praktike pruvigis plej bona ĉe la diversaj popoloj. Eble ne estas trokuraĝe nun aserti, ke ĉiu nacio jam havas « sian » lernolibron de unua grado praktike elprovitan.

Restis do solvenda alia demando ne malpli grava, sed eble eĉ pli konsekvenca: la demando pri lerno por progresintoj. Sendube estas, ke la konservado kaj porĉiama aliĝo de novaj anoj al nia movado ne nur estas unu el la plej gravaj taskoj, sed la ekzisto-kaj venkdecida. Ĝajni novajn kursanojn — relative facila afero; daŭre konservi ilin — nu, demando iun ajn kursestron de supera kurso! Malfeliĉa cirkonstanco ĝis nun estis, ke por tiaj kursoj mankis ĝenerale uzebla kaj ĉie praktikebla instrulibro. Ja ekzistis kelkaj nacilingvaj — kaj inter ili eĉ tre bonaj! — sed en ĉi tiu stadio de lernado pli necesas internacia gramatiko, por definitive glatigi kaj ebenigi la surfacon de la akiritaj konoj en la unua kurso. Tia libro devas prezenti ne nur la tutan gramatikan skeleton de la lingva korpo, sed ankaŭ ĝian karnon, t.e. ne devas defili antaŭ ni nur la seka regularo, sed antaŭ ĉio ni devas ricevi per vivantaj ekzemplaj kaj plenumendaj taskoj tiun plenan scion ankaŭ pri la kialoj de tiu aŭ tiu regulo, de tiu aŭ tiu ofta eraro, kiu igas nin memkonscie certaj. Nur kiam en nia interno jam ne moviĝas la plej eta dubo pri lingva, nur kiam ni, por tiel diri, la lingvon eĉ dorme regas, nur tiam ni ĝin vere posedas.

« La tuta Esperanto » de s-ano Seppik tion celis atingi kaj — perfekte sukcesis, se al la vorto « perfekte » ni ne volas doni la plej severan sencan, kiu transpasas niajn homajn, kaj tial eraripovajn, kapablojn. Li celas klarigi al la simpla esperantisto kaj al la esperantista kursgvidanto la kaŭzojn kial ni uzas tiun aŭ alian formon. En preskaŭ 200 paragrafoj per klaraj, ofte spritaj kaj surprizaj trafaj difinoj li prilumas la lingvajn problemojn sur la kampoj de gramatiko, vortformado, sintakso kaj stilo. Li klarigas detale, sed tamen scias eviti tiom larĝigi la problemojn, ke ilin povas ampleksi fine nur dikventra volumego, inspiranta sinceran timegon al serioza, studema lingvano.

Beka.

Budapeŝta Internacia Foiro, 29 Aprilo - 9 Majo 1938. — 2-paĝa informfolio en Esperanto.

30-a Universala Kongreso de Esperanto, Kongreslibro. Formato 12,5 x 18 cm. 32 p. kaj dukolore presita kovrilo, broŝo.

Unu monaton antaŭ la kongreso la LKK dissendis la kongreslibron — jen imitinda aranĝo por ĉiuj sekvantaj kongresoj! Envere la kongreslibro « estas nur maldika libreto, sed ĝi enhavas ĉion gravan, kion la kongresano bezonas scii, kaj pro sia maldikeco kaj praktikaj formato ĝi estas facile en- kaj elpoŝigebla.

La programo parto, okupanta duonon de la libreto, estas por facila trovebleco, presita sur kolora papero: maldekstre troviĝas la programeroj, la dekstraj paĝoj estas liberaj por notoj. Meze de la libreto (do alia praktika aranĝo), tuj trovebla, estas situo de la Kongresejo kaj de la konstruaĵoj plej gravaj por la kongresanoj.

Enhavo de la cetera parto: Antaŭparolo; Komitato; Kiel atingi la Kongresejon kaj hotelojn; Oficialaj avizoj, i.a. pri la angla mono, pri restoracioj; Esploru Londonon!; Kiel uzi la faldplanon (ĉiu kongresano ricevis kune kun la kongreslibro faldplanon pri la subteraj teroj); Ĉefaj vidindaĵoj; Utilaj vortoj kaj frazoj (anglalingvaj).

Ĉiu kongresano ricevos ankaŭ (senpage) en la Kongresejo belan albumon kun 70 artaj fotografajoj de Londono. T.J.

BES-a Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj. 13-a eldono, 1937/38. — Entute 76 p., 11 x 14,5 cm. Prezo 8 ĉ.kr. — Eldonis BES, Potštejn, Ĉeĥoslovakio. — Havebla por gld. 0.60 ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando, aŭ ĉe IEL.

Post tri-jara paŭzo, kaŭzita de politikaj kaj personaj cirkonstancoj, denove jen elvenis la ŝatata BES-adresaro, en konata formato kaj aranĝo, kun pli ol 500 adresoj el kvardeko da landoj, kaj kun 84 portretoj. La adresaro bone servos precipe al samideanoj dezirantaj korespondi kaj interŝanĝi.

E. Klimsza: Samouczek Pomocniczego Języka Międzynarodowego Esperanto. Memlernolibro por poloj en 18 lecionoj. Ekzercoj, interparoloj kaj (ĉe la fino) ŝlosilo. — 160 p., 12,5 x 20,5 cm. — Prezo ĉ.kr. 13.50 ĉe la aŭtoro: Klimsza Emil, Sucha Dolna 304, Silezio, Ĉeĥoslovakio. — Bona papero, bona preso. Komprenibile tiu ĉi « memlernolibro » taŭgas ne nur por aŭtodidaktaj sed ankaŭ por kursoj elementaj kaj superaj. Polaj samideanoj provu ĝin!

Nókkel til Esperanto. Esperanto-ŝlosilo norvega, en la formato de la konataj Ĉefeĉ-ŝlosiloj, 36 p. — 2-a reviziita eldono de Norvega Esperantista Ligo, Skappelsgt. 3, Hamar, Norvegio. — Prezo 25 oeroj, 50 ekz. 10 kr. — La revizio estas funde kaj zorge farita de R. Bugge-Paulsen en kunlaboro kun R. Kreuzt. Al la ĉefa vortaro estas aldonita nova enkonduko, kaj la « internaciaj » vortoj estas anstataŭigitaj per pli necesaj kaj modernaj; entute la listoj enhavas 300 novajn vortojn.

Brapex. 72-paĝa ilustrita broŝuro (16,5 x 23 cm.) pri la Unua Internacia Filatelie Ekspozicio, okazonta en Rio de Janeiro, la 22-30 okt. 1938. — La broŝuro estas verkita en ses lingvoj: portugala, hispana, franca, angla, germana, kaj Esperanto. — Interesuloj ricevos ĝin senpage, se ili tuj skribos al « Brapex », Caixa postal 195, Rio de Janeiro, Brazilo.

Denova komenco. Ilustrita prospekto en Esperanto, eldonita de Internacio de Militkontraŭuloj, 11 Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglujo, pri kolonio de germanaj rifuĝintoj en Pital, Popayan, Kolombio, S. Ameriko. — Aldonitaj estas kelkaj prospektoj petantaj mon-kaj alian helpon por diversaj malfeliĉuloj en diversaj landoj.

K. Wlostowski kaj W. Dobrowolski: Surdmutuloj pri si mem. Esperantigis Süsskind Schönberg. Eldono de l' tradukinto (adreso: ulica Leszno 4 m. 15, Warszawa, Polujo) kaj ricevebla de li por 1 int. resp.-kuponoj aŭ 1.10 zloto. — 48 p., 12 x 16 cm.

Süsskind Schönberg estas la unua surdmuta partopreninto de Universala Kongreso de Esperanto. Li lernis Esperanton nur en 1937 kaj nun jam gvidas Esperanto-kurson por 20 surdmutuloj en Varsovio.

La libreto donas klarigojn pri surdmutuloj, kiel ili helpas al si, pri fingro-alfabeto, mimitiko, pri instruado de buŝparolo al surdmutuloj ktp. Ĝi certe interesos multajn gesamideanojn, al kiuj senso ne mankas. La libreto estas ilustrita per 9 klišoj. Oni povas bedaŭri ke ĝi estas presita sen supersignoj; malgraŭ tio oni legas ĝin facile. -kc-

La Magazeno Selfridge. Ilustrita esperantlingva prospekto en formo de 8-paĝa broŝuro. « La konstruaĵo portas nenian indikilojn — estas supozate ke ĉiu konas ĝin kiel Selfridge. » Interese por ni, esperantistoj, estas ke la propra standardo de la firma Selfridge estas verda, kiel la nia, sed kun ŝlosilo sur ĝi. La prospekto informas pri multaj aliaj interesajoj de la grandmagazeno. Sed legu mem; petu la prospekton senpage de: Magazeno Selfridge, Londono.

Lejdeno, la instruadurbo apud maro kaj lagoj, apud arbaro kaj dunoj — tekstas la titolo de nova faldprospekto, pri la fama nederlanda universitata urbo Leiden. La prospekto estas eksterordinare bela, kun kelkaj multkoloraj reproduktaĵoj de altarbildo kaj famaj pentraĵoj, kaj kun 14 vidaĵoj en fotopreso. Unu el la plej belaj esperantlingvaj faldprospektoj ĝis nun aperintaj. Interesuloj petu ekzempleron (senpage) de: Oficejo de V.V.V., Stationsweg, Leiden, Nederlando.

Vojaĝu en Norvegio! Vojaĝu al Haugesund kaj Haugeland! Bone presita, per 6 klišoj ilustrita prospekto 4-paĝa pri la norvega urbo Haugesund en historie grava kaj pejzaĝe belega regiono Haugeland. La prospekto eldonis la turistrafika komitato, de kie ĝi estas senpage ricevebla. (Skribu al: Turisttrafiknevdnen, Haugesund, Norvegio.) Oni povas skribi en Esperanto. Estos bone, se multaj skribos, dankante, kaj petante la prospekton.

Sanigbaneja urbo Budapeŝto, la Reĝino de la Danubo, unu el la plej belaj ĉefurboj de la mondo, — tiel asertas nova esperantlingva faldprospekto 12-paĝa, kaj tiel efektive estas. La faldprospekto estas ilustrita per 10 belaj bildoj kaj urboplano, enhavas utilajn informojn, kaj ankaŭ 10 adresojn de esperantistaj organizoj. Eldonis (kaj de tie senpage ricevebla): La Ĉefurba Fremduloficejo, Deák Ferenc u. 2 Budapeŝto V, Hungarujo.

XXXIV Congressus Eucharisticus Internationalis, Budapeŝto, 25-29 Majo 1938. — 16-paĝa prospekto eldonita de la hungara poŝto, kun informoj kaj tarifoj en lingvoj hungara, angla, franca, germana, itala kaj en Esperanto. — Krome unupaĝa presajo en Esperanto pri poŝtmarkbloko.

Venu al la 34. Eŭkaristia Mondkongreso! Nova 6-paĝa faldprospekto en Esperanto. Evidente la unua prospekto tiel frue elĉerpigis, ke oni opiniis utile eldoni duan.

25-a Jubilea Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, Sevlievo, 16-18 Julio 1938. — Ilustrita faldprospekto pri la kongresurbo, en Esperanto kaj bulgara lingvo. — Krome tri diversaj poŝtkartoj kun po unu bildo kaj du lingva teksto, kaj presita Aliĝilo. — Adreso de la kongreso: S-ro Sim. St. Hesapčiev, instruisto, Sevlievo, Bulgario.

Tra la mondo

Promenado.

La mondo fariĝis dum la lastaj dudek jaroj tre malgranda. Kelkajn jarojn antaŭ la mondmilito unua sukcesinta salto per aeroplano trans la Ĉanelon ankoraŭ ĉapablis entuziasmigi tutan homaron, — nun flugo dum kvar tagoj ĉirkaŭ la terglobo apenaŭ veĉas sensacion. Certe, ankaŭ Howard Hughes, al kiu sukcesis tiu flugo, estis akĉlame akĉceptata, la ĵurnaloj graslitere raportis pri lia entreprenado; sed cetere ni emas akĉcepti tiajn aferojn jam kiel ordinaraĵojn. Ni kompletite jam alkutimiĝis, ke ĉiujare la antaŭaj rekordoj estas plibonigataj, kaj ni fakte nur mirus, se en iu jaro iu cifero ne estus superata. Tio estas la « progreso », kaj ĝin ni akĉceptas kiel memkompreneblan, ja preskaŭ neeviteblan.

Nur pri du aferoj ni ne multe progresas: pri interpacigo de la homaro, kaj pri enkonduko de l' internacia lingvo. Scienco kaj tekniko festas triumfojn, sed tuthomara kunlaborado kaj interkompreno postrestas, kaj sciencon kaj teknikon oni plej volonte uzus por reciproka neniigo. Ĉu la bonaj spiritoj formortis? Ĉu regas nur diablo en la homaj ĉoroj? Estus fatale, tion kredi. Pli verŝajne la bonaj spiritoj nur dormas. Vekiĝinte, ili certe miros pri la diabla semaĵo dum grandiginta. Ĉu ili sukcesos ripari kio estas difektita? Ĉu ili refaros malamon — je amo, mensogon — je vero, kaj ĉu ili faros teron-inferon — je teroparadizo?

Nun, ironte al la Kongreso, aŭ al niaj libertempoj, ni formetu la dubojn, ni ŝanĝu ilin je kredo. Ni mem estas parto de la homaro kreanta aŭ eraranta. Do ankaŭ de ni dependas rezultoj estontaj. Ni estu bonuloj, kaj per nia ekzemplo ni aliajn bonulojn faros.

Nunaj konfliktoj ridigos estontajn generaciojn, diris usona ambasadoro Pariza.

« La amerikanoj ne povas agnoski, ke milito estas neevitebla, » diris William Bullitt, usona ambasadoro en Parizo, okaze de memorigo pri la usonanoj mortintaj dum la mondmilito. « Nuntempaj konfliktoj inter la modaj ideologioj ridigos estontajn generaciojn. Ni estas konvinkitaj, ke milito por reguligi la aktualajn eŭropajn konfliktojn estus samsignifa kun dezertigo de tiu ĉi kontinento. Ni, amerikanoj, kies sango formas miksaĵon el preskaŭ ĉiuj sango-specoj de l' mondo, plene konscias pri la rimarkindaj kontribuoj, faritaj de preskaŭ ĉiuj rasoj de Eŭropo al nia sango kaj al nia civilizo. Ni kredas pri

la unueco de l' eŭropa civilizo, kaj milito en Eŭropo por ni estus nur abomeninda intercivitana milito inter fratoj. Ni opinias, ke la diferencoj de nia generacio devas esti solvataj per parolo kaj kompreno... » Al kio estu permesate aldoni, ke unu el la precipaj rimedoj por atingi tian solvon « per parolo kaj kompreno » estas la internacia lingvo, ĝuste nia Esperanto.

Sed provizore ankoraŭ daŭras la malkompreno, en kaj ankaŭ ekster Eŭropo. Hispanujo plu brulas, kaj eĉ plej grandaj optimistoj ne atendas la finon de tiu brulo antaŭ la venonta printempo. La samon oni povas diri pri Ĉinujo. En Palestino, la tiel nomita « sankta » lando, ne estas videbla multa sankteco: anstataŭ lakto kaj mielo tie fluas sango de judoj kaj araboj; murdoj kaj bomboj parolas lingvon de malamo en la iam tre « laŭdita lando ».

Kien?

Ĉiutage en la lasta tempo, centoj da judoj en Vieno kaj aliaj lokoj germanlandaj ricevis siajn dokumentojn por elmigri. La demando estas: kien? Ne voleme la diversaj ŝtatoj akceptos ilin. Multo estas babilita pri humaneco; sed belaj vortoj ne utilas, — necesas agoj.

Sub honora prezido de Henri Bérenger, kaj efektiva prezido de Myron Tylor okazis en Evian (Francujo) internacia konferenco por pritrakti la problemon de l' rifuĝuloj, judaj kaj nejudaj. Ĝia ĉefa rezulto estas, ĝis nun, formado de interregistara komitato kun sidejo en Londono. Sed la problemo estas tiel akuta, ke ĝi al solvo tuja devigas.

La Diabla Insulo ĉesos esti punkolonio ... kie ankaŭ senkulpe suferis samideano.

La pli poste rehonorigita kapitano Dreyfus, kiu estis kondamnita pro landperfido, estis ne la sola homo senkulpe suferinta en Cayenne. Antaŭ kelkaj jaroj revenis de tie nia samideano Paoli A. Schwartz, vaste konita en Germanlando kiel « la lasta germana militkaptito ». Li estis filo de alsacano, mem vivinte en Alsaco antaŭ la mondmilito militservis en la germana armeo, kaj estis de la francaj militaj aŭtoritatoj kondamnita kiel « dizertulo », ĉar hazarde li estis naskita sur franca teritorio. Dum multaj jaroj, eminentaj germanaj kaj francaj viroj klopodis atingi lian liberigon, kaj kiam fine ili sukcesis elŝiri lin el la sur-

tera infero de Cayenne, li estis homo preskaŭ rompita.

Baldaŭ la Diabla Insulo ĉesos esti punkolonio. Jam en la pasinta jaro la franca ministro de justeco decidis ke neniu kondamnito plu estu sendata al Cayenne. Nun tiu decido ricevis leĝan povon. La kondamnitaj, nunmome restantaj sur la Diabla Insulo, devos ankoraŭ finsuferi sian punon tie, sed novaj krimuloj plu ne estos tien ekspedataj.

La ĉesigo de la timata punkolonio estas venko de l' humaneco, grandparte dankata al la Savarneo, kiu dum longa tempo klopodegis ĉe la francaj aŭtoritatoj por likvidi tiun kolonion nehomindan.

Belega verko de paco.

Povas al multaj samtempuloj ŝajni, ke ni vivas en konstanta milito, anstataŭ en paco. Sed se estas vere, ke « milito detruas, sed paco konstruas », ni tamen vivas en paco.

Dum la mondmilito estis grandparte detruita la katedralo de Reims, unu el la plej gloraj verkoj de gotika arto en la tuta mondo. Britaj oficiroj de la okupa armeo, kiuj estis vidintaj tiun belegan katedralon, kiam poste ili restadis en Kolonjo, disputis inter si sur paĝoj de « Cologne Post », ĉiutaga anglalingva ĵurnalo dum la okupacia periodo, ĉu estas pli bela, pli « purstila » la katedralo de Kolonjo aŭ tiu de Reims, kaj tiu de Reims akiris la palmon.

Nun tiu belega preĝejo estas restarigita. Post 24-jara silentado denove ĝiaj sonoriloj muĝe aŭdigis siajn metalajn voĉojn malproksimen trans la landon kiu ĝoje aŭskultis ilian pian preĝon.

« Ke estu la katedralo de Nia Sinjorino, » diris en sia prediko la arkepiskopo de Reims, « iam kripligita, nun renaskita, viva protesto kontraŭ ia detruo, ia kripligo kaj ia vundado milita. Ke volu Nia Sinjorino de Reims, per la belegeco kiun ĝi montras al ni, forpreni la kaŭzojn de la konfliktoj kiuj disigas Eŭropon. Ke ĝi inspiru al ĉiuj la deziregon al paco kaj frateco... La ŝtonoj de ĉi tiu katedralo elkriegas ne venĝon sed la Halelujon de ĝia releviĝo! »

Nia afero.

Kiam tiuj ĉi linioj estos presitaj, mil sescent gesamideanoj jam pakis sian valizon kaj estos survoje al Londono, aŭ jam alvenis tie. Kun la kongreslibreto kaj la bonega plano en la poŝo, kiujn la Loka Kongresa Komitato frutempe sendis al ili, la kongresanoj ne perdiĝos en la grandega urbo.

Mi deziras al ĉiuj partoprenantoj agrablan kongresan semajnon. Kaj ne forgesu: UNUECO ESTAS FORTO!

Zigzag.

“Ni kapablas”

« Ni kapablas » — jen la moto kiu donis nomon al la granda ekspozicio okazanta en Oslo de la 12-a de majo ĝis la 18-a de septembro ĉi-jare. La rekta kaŭzo de la ekspozicio estis la centjara jubileo de Metia kaj Industria Unuiĝo de Oslo, sed oni ne kredis ke la ekspozicio estas limigita je la metiaj kaj industriaj fakoj. Dum la planado la ekspozicio nome evoluiĝis al granda entrepreno, kiu celas prilumigi la vivon de la moderna socio de ĉiuj flankoj.

La ekspozicio havas belan situon ĉe la idilia « Frognerkilen » (brako de la Oslo-fjordo), kaj Oslo atendas ĉi-somere vizitantojn el ĉiuj partoj de Norveglando kaj najbaraj landoj.

Kia festo estas aranĝo de tia ekspozicio! La postulanta moto de la entrepreno igis ĉiujn partoprenantojn fari sian plej bonan kaj kiam ĉio estis preta kaj la ekspozicio malfermita, oni ĝojis pro la rezultoj atingitaj post monatoj de obstina klopodo.

Oslo kaj tuta Norveglando atendas amuzan someron. La ekspozicio disponas plurajn novkonstruitajn restoraciojn kun loko por pli ol 6.000 gastoj, kaj luitaj estas la plej bonaj danc-orkestroj kaj artistoj haveblaj. La amuza sekcio, kiu ampleksas terenon de 10.000 kvadrataj metroj, havas atrakciojn, kiuj superas ĉion ĝis nun viditan en nia lando.

La ĉef-enirejo de la ekspozicio estas de la nova Filipstad-vojo, kiu ekiras de la Drammen-vojo. Antaŭ la enirejo levas sin ĝis alto de 35 metroj la blinde blanka « tranĉilo », simbolo de la energio kiu tranĉas tra la kaoso. Irante dekstren de la enirejo ni venas al la tri industriaj haloj, kiuj ampleksas entute 5.000 kvadratajn metrojn. Jen sekcioj de konfekcio kaj trikaĵo, de felaĵoj, vojaĝartikoloj kaj ŝuoj, kaj de paperindustrio; plue sekcioj de elektrotekniko, pri la « rulanta materialo » de la Norvegaj Ŝtataj Fervojoj k.s., de manĝaĵoj kaj de bankaj kaj asekuraj aferoj.

En aparta halo estas demonstrataj la rimedoj per kiuj oni protektas la industriajn laboristojn kontraŭ profesiaj akcidentoj.

Sekvas la sekcio de faka instruado — kun la moto: « Mi deziras havi profesion ». La sekcio ampleksas psikoteknikajn provojn kaj porjunularan fakbibliotekon kun legejo.

Poste venas la halo de la teks-industrio, la granda halo de la metioj kaj la sekcioj de ŝipirado kaj turismo. La lasta sekcio ampleksas du etaĝojn, kaj de la supra etaĝo oni povas iri rekte al la manĝejo de la ĉefrestoracio, kiu povas gastigi proksimume 2.000 personojn samtempe. Ligita al la restoracia konstruaĵo estas kongresa halo kun loko por 1.500 personoj. De la festplaco antaŭ la ĉefrestoracio kondukas ponto al la restoracio « Kongen » (« La reĝo »), ĉiuflanke ĉirkaŭita de akvo kaj kun superrigardo al la Oslofjordo kaj la ekspozicia tereno.

La ekspozicio prezentas ankaŭ multajn aliajn aferojn, ekzemple halon pri norvegaj pentro-arto kaj grandan halon por ŝanĝantaj ekspozicioj, i.a. la unua balenkaptada ekspozicio de la mondo.

Maldekstre de la enirejo troviĝas i. a. la 75 metrojn alta turo de la ekspozicio, de kiu oni havas vastan superrigardon al la ĉirkaŭejo.

Oslo faros ĉion por agrabligi al la vizitantoj la restadon kaj deziras al ĉiuj koran bonvenon.

Diversaĵoj

Kongreso pri Vinoj en la lando de l' vino

Dum la lastaj someraj tagoj de tiu ĉi jaro okazos en Lisboa, la portugala ĉefurbo, la 5-a Internacia Kongreso pri Vinberoj kaj Vino, en la Parlamentejo. Tiu kongreso, kies prepara komitato vigle laboras, havos distro- kaj laborplanan programon. Partoprenos la registaroj de Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Germanujo, Greklando, Hispanujo, Italujo, Luksemburgo, Nord-Afriko (ĉu Maroko? - Red.), Rumanujo kaj Svislando, krome la portugala, kaj multaj privatuloj. Oficialaj lingvoj de la kongreso estos la franca, germana, itala kaj portugala, kvankam ĉiu kongresano rajtos uzi sian navian lingvon. Ni povas do esperi, jam de nun, novan Babel-eton.

Samtempe okazos Medicino-Scienca Kongreso pri la Vino, kun la sama programo rilate al ekskursoj kaj distraĵoj, kvankam estos vizitoj al sanigejoj ktp. specialaj por la kuracistaj partoprenantoj.

La portugala esperantistoj bonvenigos ĉiujn esperantistajn partoprenantojn, kiuj profitos tiun okazon ekoni unu el la plej malnovaj eŭropaj ŝtatoj, ĝiajn tipajn morojn, la belecon de ĝiaj pentritaj pejzaĝoj kaj la bonecon de ĝia klimato.

Informoj riceveblaj en la oficialaj lingvoj de: Ministerio da Agricultura, Lisboa, Portugalujo. J.B.A.

Somera kurso pri « Scienco kaj Paco »

okazos la 16-29.8.1938 en la kastelo de Montcel, en Jouy-en-Josas (Francujo), proksime de Versailles. La kurso estos aranĝita de la komitato de Internacia Pac-Akademio fondita en januaro nunjara en Genevo. Dum la kurso estos farataj prelegoj en lingvoj franca kaj angla; nome parolos: B. de Ligt pri « Enkonduko al la scienco pri la paco », Har Dayal pri « Antropologio kaj milito », A. Groeneveld pri « Psikologio kaj milito », Simone Weil pri « Socio kaj milito », Wilfr. Wellock pri « Novaj batalmetodoj », Maria Montessori pri « Porpaca edukado de la junularo », kaj Harold Bing pri « Memedukado por paco ». Ĉiutempe estas traktata aparta temo, kiun sekvas diskutado. La posttagmezoj estos liberaj por naĝado, teniso, promenadoj aŭ ekskursoj. — Adreso de la sekretariejo: 72 Abbey Road, London N.W. 8, Anglujo.

Unua Internacia Filateliala Ekspozicio en Rio-de-Janeiro.

La Unua Internacia Filateliala Ekspozicio, okazanta en Brazilo sub la nomo BRAPEX, havos lokon en Rio-de-Janeiro, de la 2-a ĝis la 30-a de oktobro nunjara. La ekspozicio estas organizota de la Brazila Filateliala Klubo, kiu komisiis tiun laboron kaj ĝian realigon al Organiza Komisiono. Ĝi estas oficialigita kaj subvenciita de la brazila registaro kaj efektiviĝos sub la honora prezido de la Respublika Prezidanto kaj la patroneco de la Ministroj de Trafiko kaj de Financo kaj de « Internacia Filateliala Federacio » kaj « Federacio de la Filatelialaj Societoj ».

La Organiza Komisiono baldaŭ eldonos bele ilustritan Bultenon enhavantan la Regularon de la Ekspozicio kaj la Klasifikon de la elmontrotaj objektoj. Ĝi estos redaktata en la ĉefaj nacilingvoj kaj en Esperanto.

Bonvolu tuj peti la Bultenon de: Comissão Organizadora da BRAPEX, Av. Rio Branco, 117, 2º and., Rio-de-Janeiro, Brazilo.

Filatelio

Ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj 1918—1938.

La intereso de la vasta publiko pri poŝtmarkoj konstante altiĝas. Tial poŝtmarkoj estas efika rimedo, per kiu oni povas disvastigi la konon de kulturaj aferoj, gravaj okazintaĵoj el nacia historio, historiaj memoraĵoj kaj naturbelajaĵoj.

Ĉeĥoslovaka poŝta administracio scias bone jam dekomence pri tiu propaganda signifo de poŝtmarkoj kaj zorgas, ke ili reprezentu Ĉeĥoslovakion plej bone. Tial ĝi dediĉas al ties aranĝo en arta kaj teknika rilatoj sisteman zorgon.

Dank' al la matureco de la hejma grafika industrio okazis, ke en decembro 1918 — du monatojn post renovigo de ŝtata sendependeco — la ĉeĥoslovaka poŝta administracio povis eldoni siajn proprajn poŝtmarkojn. Komprenoble pro tiama manko de krudaj materialoj kaj teknikaj instalaĵoj la ĉeĥoslovakaj markoj unue estis fabrikitaj per plej simpla maniero t.e. libroprese. Sed en relative mallonga tempo de kvin jaroj oni sukcesis pliperfektigi la fabrikadon de poŝtmarkoj tiel, ke jam en jaro 1925 oni presas ilin laŭ plej perfekta grafika tekniko — per rotacia elfprofunda ŝtalpreso. De tiu jaro ĉiu nova emisio de ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj signifas plian altigon de ties arta kaj grafika nivelo.

La plej grandan intereson pri ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj montras la kolektantoj. La poŝta administracio klopodas konservi ĉi tiun intereson per sia partopreno en ekspozicioj lokaj kaj internaciaj, ne nur en ekspozicioj filatelistaj, sed ankaŭ de grafika industrio k.s.

En internaciaj ekspoziciaj konkursoj ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj vekis vivan intereson. Dum 1928—1937 ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj estis sesfoje honorataj per « Grand Prix » dufoje per ora medalo kaj kvarfoje per honora plaketo, kiu laŭ ekspoziciaj regularoj estis la plej alta premio en grupo de ŝtataj ekspozicioj.

Al la populareco de ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj helpas ankaŭ tio, ke en elekto de bildaj motivoj la poŝta administracio zorgas pri diverseco kaj efiko, egale ĉu temas pri motivoj figuraj aŭ pejzaĝaj. Poŝtmarkoj montras antaŭ ĉio la estron de la ŝtato (T. G. Masaryk, D. E. Beneš). Plue ili disvastigas la konon de nomoj kaj portretoj de eminentaj reprezentantoj de ĉeĥoslovaka popolo kaj ĝia kulturo, kies verko estas konata en eksterlando (Komensky, Štefánik, Dvořák, Smetana, Tyrš, Fügner, Purkyně), ili eternigas memorindajn datrevenojn de historiaj okazintaĵoj: miljaran ŝtatan tradicion kaj kristanan kulturon, centjaran datrevenon de nacia himno, devenon kaj agadon de ĉeĥoslovakaj legioj dum la mondmilito ktp., kaj alportas vicon de plaĉaj motivoj: kastelojn, urbojn kaj naturajn belaĵojn.

Plej plaĉaj estas de jaro 1936 eldonataj bonfaraj poŝtmarkoj kun alpago, el kies profito la poŝta administracio elpagas al humanaj institucioj preskaŭ 5 milionojn da ĉeĥaj kronoj por subteno de malriĉaj, suferantaj infanoj. De 1919—1937 oni fabrikis pli ol 17 miliardojn de ĉeĥoslovakaj markoj en suma valoro de preskaŭ 9 miliardoj da ĉeĥaj kronoj. Do la ĉeĥoslovaka poŝtmarko estas grava parto de kultura kaj ŝtata propagando kaj ne malpli grava faktoro naciekonomia kaj sociala.

Kvankam la vendadon de ĉeĥoslovakaj markoj prizorgas ĉiuj ĉeĥoslovakaj poŝtoficetoj kaj plejparte ankaŭ multaj privataj vendistoj de poŝtaj valorajoj, tamen por aĉeto de poŝtmarkoj kaj por filatelistaj celoj poŝta administracio starigis apartan giĉeton ĉe la ĉefa poŝtoficeto en Praha II, Jindřišská ulice (filatelio), kie oni vendas ĉiujn ĉeĥoslovakajn poŝtmarkojn, sendifektajn, konformajn al ĉiuj postuloj de kolektantoj. Sekve de tio oni povas ankaŭ el eksterlando mendi ĉiujn ĉeĥoslovakajn novaĵojn, skribante en Esperanto.

Harry Khel.

PROPAGANDU

ĉiam, ĉie ĉiel,
kiam, kie kaj kiel eble !

RABAT, la ĉefurbo de Maroko

(Vidu la artikolojn pri « Maroko », « Casablanca » kaj « Marakeŝ » en la junia kaj julia numeroj!)

Survoje el *Mehydia*, kien okazis ekskurso de marokaj esperantistoj organizita de samideanoj el Port-Lyautey, ni haltis en *Rabat*, la ĉefurbo de Maroko.

Mirinde bele situanta meze de oranĝaj ĝardenoj, ĉe la oceano, en loko kie rivero Buregreg enfluas la maron, sur altaĵo, la urbo prezentas belajn vidaĵojn. Konstruis ĝin sultano Almohad Abd el

stilo, sed vastegaj, ĉirkaŭitaj de belegaj ĝardenoj franca kaj andaluzi-araba. Ĝardenoj, plantitaj per diverskoloraj floroj, faras kun la koloroj de l' ĉielo, de l' oceano, kaj kun la blanko de l' muroj harmonion de neforgesebla beleco.

Same bela vidaĵo etendiĝas de la supro de l' Hassan-turo. La turo estis kon-

tiu arta tombo estas kovrita per ĉarpentitaj kaj skulptitaj ŝtonetoj. Minareto, restaĵo de ruinigita moskeo, tie troviĝanta, estas aparte bela; ĝia fasado estas ornamita per polikroma fajenco; per la sama fajenco estas ornamita apuda moskeo, sed en mozaika formo.

Aliaj tomboj malpli imponaj rememorigas, laŭ siaj surskriboj, la brilan pasintecon de la dinastio.

Poste ni direktas nin al la sidejo de l' rezidanto. Bela kaj majesta estas la rezidejo, palaco impona laŭ vasteco, kun belegaj ĝardenoj, fontanoj kaj aleoj. Ĝi estas eĉ luksega en sia aspekto kaj impresa, troviĝanta ne malproksime de la nealirebla, mistera sultana palaco. En ĝia proksimeco situas preskaŭ ĉiuj administrativaj konstruaĵoj de la maroka registaro kaj militistaj oficejoj. Do, direktoj de la higieno kaj sano, industrio kaj komerco, agrikulturo, publikaj laboroj, financoj, indiĝenaj aferoj ktp. Ne malproksime de la urbcentro troviĝas Instituto de altaj marokaj studoj, direkcio de indiĝenaj artoj kaj, ankoraŭ pli poste, la sportejoj.

La urbo, moderna, konstruita kun la sama energio kiel Casablanca, kun same vastaj belegaj avenuoj kaj bulvaroj, sed pli sinjoreca, pli bontona. Ĝi dronas en verdaj, arboj, floroj, ĝardenoj, ĉiuloke serenigas kaj ripozigas la enloĝanton. La plej vigla avenuo estas tiu de Marie Teuillet, ĉe kies flankoj situas multaj kafejoj kaj modernaj magazenoj, provizitaj de Parizaj firmoj.

Jam ni direktas nin al la aŭtoĉara stacidomo: ni devas ankoraŭ alveni al *Mehydia*. De *Port-Lyautey*, kiun ni pasos veturante al *Mehydia*, dividas nin 34 kilometroj da asfalta rubando, iom pli ol duonhora veturo.

Simpatian impreson faris al mi tiu ĉi malgranda, pura kaj moderna urbo. Ni venis duonhoron pli frue ol ni estis anoncintaj nin, tamen ni havas tro malmulte da tempo por viziti la urbon; sed rapide forpasas la minutoj dum babilado. Jen ĉe stratangulo aperas aŭtomobilo, gaje flirtas la verda Esperanto-flageto. Mi premas la manon de sinjoroj Thollet, la invitinto, kaj Lascombe. Oni nin sciigas ke ĉiuj invititoj troviĝas jam en *Mehydia*. Belega estis la veturo, ofte laŭ marbordo, en komforta aŭtomobilo; interesa la rivera haveno de *Port-Lyautey*, kiun ni preterpasis dumvoje; interesaj la fiŝkaptistaj ŝipoj, ŝipetoj, boatoj. La simpatia invitinto mem kondukas la aŭtomobilon kaj agrabligas la veturon per mallonga skizhistorio de *Port-Lyautey* kaj *Mehydia*, kiun mi kunligas kun jam antaŭe akiritaj scioj pri tiuj lokoj.

Laŭ onidiro, la urbo, kiu nun portas la nomon *Port-Lyautey*, estis konstruita de portugaloj en la 16-a jarcento, kaj nur antaŭ nelonge oni anstataŭigis ĝian malnovan nomon *Kénitra* per nova. Re-



RABAT: Kastelo Oudaïas, de la mara flanko.

Moumen, komence de la 12-a jarcento, intencante tie koncentri sian militistaran forton kaj la necesan materialon por siaj militaj ekspedicioj. Tiutempe la urbo nomiĝis *Rabat el Fath* (Kampo de l' Venko). La entreprenon de la sultano daŭrigis lia filo Joussef kaj, poste, lia nepo Jakoub el Mansour, konstruante la kastelon de Oudaïas kaj la grandegan moskeon Hassan, de kiu restis minareto, kiu kune kun la ruinoj de la moskeo donas hodiaŭ imagon pri ĝia grandeco.

Apud Rabat kuŝas *Salé* — oni vidas ĝin de la supro de l' ruinoj Oudaïas —, malgranda urbeto, tamen kun granda aŭ, pli ĝuste, timiga pasinteco. Tiu eta urbo estis iam fama pirata respubliko, kontraŭ kiu vane batalis la franca reĝo Ludoviko 14-a kaj kiun fine venkis en la 18-a jarcento iu prapatro de la nun reganta sultano.

La plej bela panoramo etendiĝas antaŭ ni, kiam ni staras sur la ruinoj de la kastelo Oudaïas, situanta sur abrupta rokaĵo. Je unu flanko *Salé*, blanka, alcentrigita laŭ orienta kutimo. Malsupre la oceano frapegas per blankaj ondegoj la nigrajn rokojn, fariĝante jen verda, jen ĉielblua, jen blanka. Malproksime blankas araba tombejo, kaj apude granda Buregreg silente transdonas siajn akvojn al la maro. Aliaflanke vidiĝas du palacoj: tiu de l' rezidanto, kaj tiu de l' sultano. Ambaŭ malaltaj laŭ araba

struita en la 12-a jarcento kiel minareto de grandega moskeo. Planoj antaŭvidis konstruaĵon vastan je 26,000 kvadrataj metroj, kie sole la preĝeja salonego apogis sin sur preskaŭ 500 kolonoj. La turo estas 44 metrojn alta. Fiera Jakoub el Mansour volis ankoraŭ pli senmortigi sian nomon ol la konstruintoj de l' piramidoj. De tio restis nur la turo kaj restaĵo de duone ruinigitaj kolonoj, inter kiuj vegetas kaktoj kaj tranvilaj olivarboj, kaj flaviĝas herbaĵo polvokovrita pro pluvmanko kaj forlaso.

Ni proksimiĝas al *Chellah*, iama grava urbo el la 8-a jarcento, tra kampa vojo, kaj haltas antaŭ altega muro ĉirkaŭzonanta tiun nun malnovan tombejon, kie ripozas en eterneco multaj regnestroj de *Maghreb* (= araba nomo de Maroko). Ni eniras tra vasta pordego, per si mem arta majstroverko, ankoraŭ unu el la plej belaj artaĵoj de Rabat, kian similan oni ne trovas en tuta Maroko.

Antaŭ ni etendiĝas vastega spaco je ĉ. 300 metroj. Tie kaj tie ĉi blankas tombokuploj de multnombraj *marabu* (= arabaj sanktuloj) kaj maŭzoleoj de la sultana dinastio de Merenidoj, kreintoj de tiu ĉi nekropolo. Unue okulfrapas grandioza maŭzoleo de « Sultano La Nigra », Abou el Hassan Ali, la plej potenca el la Merenidoj, reĝo de Norda Afriko kaj duono de Hispanujo. Li famiĝis pro sia sanga regado. La fasado de

La aĝo de la Universo

La teorio de la longaj kaj mallongaj limtempoj

Koncerne la staton de la lastaj sciencaj esploroj pri la aĝo de la universo ekzistas du teorioj: la teorio de la longa kaj tiu de la mallonga limtempo.

Laŭ la teorio « longa », la galaksioj kaj ĝiaj pli malnovaj astroj estus proksimume 1000 ĝis 10.000-foje pli aĝaj ol nia tero, kio signifas daŭron de pli ol 10 jaroj al 13-a potenco. Tiu ĉi teorio estis akceptita ĝis la lastaj jaroj unuvoĉe de ĉiuj sciencistoj. « Ĉi inspiras al ĉiuj astronomoj », skribis Paul Couderc, « la plej grandan fidon ». Sed tiu ĉi fido estis trompa. La teorio de la longa limtempo estas detruota.

La teorio de la mallonga limtempo asertas, ke la universo povas esti ne pli aĝa ol 10 miliardojn da jaroj.

La teorio de la longaj limtempoj estis bazita sur pluraj metodoj. La plej interese metodo estas tiu de la samvalorpartigo (ekvipartigo) de la kineta energio. Se en miksaĵo de gasoj estiĝas ekvilibro, tiam egaliĝas la energio de la diversaj molekuloj post multnombraj interpuŝiĝoj de tiuj ĉi molekuloj. Oni komparas la molekulojn de la gasoj kun la stelaj kaj hipotezas, ke nia galaksio ekvilibras, kio proksimume estas fakto. En la universo ludas la interagoj inter la steloj la saman rolon, kiel la interpuŝiĝoj de la molekuloj. Oni konjekte kalkulas la probablon de tiuj ĉi interagoj aŭ « duonaj puŝataĵoj ». Oni konas la relativan rapidon de la astroj (po 50 kilometroj dum sekundo); oni konjekte kalkulas la limtempojn ĝis ekvilibriĝo, la tielnomatan « galaksiĝan daŭron » kaj venas por nia galaksio al nombro 3 oble 10 al 13-a potenco, aŭ de 30 trilionoj da jaroj. Aliaj metodoj, precipe tiu, kiu

baziĝas sur la teorio de la evoluo de la astroj, venas al la sama rezulto.

Kontraŭ tiu ĉi kalkulado estiĝas multaj argumentoj. Ni konas la dimension de la universo kaŭze de la ruĝkoloriĝoj de la spiralaĵoj nebulozoj, ĉe kio tiu ĉi ruĝeta koloriĝo estas interpretata kiel efekto de Döppler-Fizeau. Tiuj ĉi spiralaĵoj malproksimiĝas de ni des pli rapide, ju pli granda estas ilia distanco de ni. Ili malproksimiĝas de ni per rapido, kiu pliiĝas je po 200 kilometroj en sekundo por ĉiu miliono da lumjaroj. Tiel rezultas la aserto, ke la universo plivolumenteniĝas dum po 20 milionoj da jaroj je 1 procento. Kaŭze de tiu ĉi teorio antaŭ 2 miliardoj da jaroj estis la diametro de la universo egale al nulo. Tio signifas, ke ĉiuj spiralaĵoj estis en kontakto kaj la tuta materio de la universo formis unusolan kompaktan mason. Eĉ se ni hipotezas, ke la plivolumenteniĝo de la universo estis ne ĉiam konstanta, tiu ĉi teorio malpermesas ĉiun taksadon de la aĝo de l'universo, kiu superas 10 miliardojn da jaroj.

Alia metodo venas al la sama rezulto. La astroj perdas materion per radiado, kaj aliĝoj en la materioj tendencas perturbi la ekvilibron. La astronomo Mineur prikalkulis, ke la perdoj de materio perturbas pli rapide la ekvilibron, ol la kunpuŝiĝoj kaj la « duonaj puŝataĵoj ». Sekve de tio la tempo ne laboras por, sed kontraŭ la efektiviĝo de la ekvilibro. La ekvilibro de la universo tamen estas efektivigita ĝis 10 procentoj. Mineur tial venas al la konkludo, ke la universo devas esti pli malmulte aĝa ol 20 miliardojn da jaroj. Sed oni ne malkonsideru, ke la teorio pri la plivolumenteniĝo

de la universo baziĝas sur la hipotezo, ke la efekto de Döppler-Fizeau povas esti uzata por la prikalkulo de la rapidoj de l' nebulozoj. Se tio estas prava, tiam ni devas supozigi, ke la rapidoj de l' nebulozoj fariĝas post pli malpli longa tempo kaj je granda malproksimumo pli grandaj, ol tiu de la lumoj, kio problemigas la tutan teorion relativecan. Multaj astronomoj tial provas hipotezi alie la ruĝetan koloriĝon de la nebulozo. Se tiuj provoj sukcesus, kio nuntempe tute ne estas certa, tiam disfalas la teorio pri plivolumenteniĝo de la universo.

Alia hipotezo asertas, ke la uranio kaj torio estas naskitaj de aliaj elementoj, same kiel naskas la uranio proaktinon, kaj la torio radiumon, aktinon kaj mezotorion. Enrico Fermi, Otto Hahn kaj Lise Meitner pruvis la ekziston de laŭvice post la uranio estantaj elementoj, kiuj havas pli grandajn atompezojn ol la uranio, kies atompezo, kiel sciante, estas 92. Tiel ni havus elementojn kun la atompezoj 93, 94, 95, 96, 97. Ne estas neeble, ke en la perioda sistemo de Mendeleicov ekzistas transe de uranio ankoraŭ aliaj periodoj. Se tio estus prava, tiam la ekspado de la evoluo de la atomoj estus komencinta longe antaŭ la momento, je kiu oni fiksis la disfalon de la tiel nomataj klasikaj serioj. Tiukaze oni devus reveni al la teorio longtemp-lima.

Se la interpretado de ruĝkoloriĝo de la nebulozoj kiel efekto Döppler-Fizeau estas ĝusta, tiam, por tiuj nebulozoj, kiuj malproksimiĝas de ni per pli granda rapido ol tiu de la lumoj, la tempo ŝanĝus la antaŭsignon, — eventualo, kiun estis konsiderinta ebla siatempe jam Henri Poincaré.

Certe estas, ke la solvo de tiu ĉi problemo nur povas esti trovata per la dubla metodo de la astronomio kaj de la radio-aktiveco. Se ambaŭ metodoj venos al similaj rezultoj, oni povos akcepti la solvon probabla.

(De D-ro J. Slavnik en « Prager Presse ».)

Trad. Boroŝo.

konstruis la urbon francoj en 1912, farante el ĝi modernan francan urbeton, kun grava rivera haveno, kun eta indiĝena kvartalo por arabaj laboristoj, kaj mi informiĝas de ĉeestanta atestanto pri duma disvolviĝo de la urbo.

Ni proksimiĝas al la celo de nia ekskurso, post 9-kilometra veturo. Salutas nin survoje malnova *kasbah* (=kastelo). Medite mi rigardas la konstruaĵon, memorigantan pri la fenika epoko; ja laŭ historiaj signoj fenikoj faris de *Mehydia* komercan faktorian. Oni rigardas la defendajn murojn kaj la grandan ĉefan pordon; ĉio troviĝas en stato de forlaso. Observante mi rememoras la detalojn pri ĉi tiu loko.

Laŭ onidiro, la kartagano Hannon kreis ĉi tiun kolonion, sub nomo *Thymateria* en la 6-a jarcento antaŭ Kristo.

Sub la nomo *El Mamoura* oni rekonas ĝiajn signojn en 937. En 1185 Jakoub el Mansour aranĝis ĉi tie gravan foiran centron. Dum la tempo de pirata respubliko ĝi estis konata sub la nomo Sebou, kien rifuĝis malfeliĉuloj persekutitaj de piratoj. Poste venis hispanoj, holandanoj. Fine, en 1515, la portugala reĝo Manuel sendis okmil soldatojn kaj ducent ŝipojn; sed la brava sultano rebatis la invadintojn, ĵetante kvarmil soldatojn en la profundan maron. Poste li ekloĝis en la urbo, ĝin rekonstruinte, kaj donis al ĝi la nomon *Méhdia*, kio signifas « donaco ».

Sed jam ni aŭdas voĉojn. Pasigita estas la kurbigo de la kampa vojo. Ni troviĝas en arbareto apud granda lago, ĉirkaŭataj de samideana rondo.

Irène Fink, Casablanca.

La plej granda scio estas scii, ĉiom oni devas scii por kompreni, ke oni malmulte scias.

★

Se la pensoj ĉiam estas direktitaj sole al tio, ĉio estas bona, la feliĉo nepre devas sekvi.

★

Antaŭ ĉiu komenco utilas bona pripenso.

★

Noĝto facile trompas — tago misteron rompas.

★

Hodiaŭ plenforta — Morgaŭ jam morta.

Kazimierz Przerwa Tetmajer :

La sonorileto de dronintoj

Estis kamparo ĉe la rivero, kiu unu-loke disverŝiĝis en larĝan, malhelan, preskaŭ senmovan akvan profundaĵon. Laŭlonge de la dekstra bordo de l' profundaĵo estis ĉirkaŭaĵo ŝtonara, dezerta; poste sekvis arbaroj kaj montoj. Laŭ la maldekstra bordo kreskis maldense juniperoj, etaj piceoj kaj larikoj, fine ruĝiĝis la arbaro. Samflanke, sur la rando de surŝutaĵo ĉe la akvo, staris blankigita, ŝtona, malgranda kapelo, kovrita de konusa, pinta tegmento el rusta lado, en kies supro altenleviĝis nigra, rusta, fera kruco.

La eniro al la kapelo estis malalta, laŭarke tranĉita. Interne sur ŝtona, frakasita planko staris mallarĝa ligna benketeto. Supre de sur diagonala trabo pendis sonorileto, kies ŝnuro tiel defalis ke, sidante, oni povis sonorigi.

Neniu memoris plu pri la dato, kiam, en iu vintra nokto, edziĝfestantoj, transveturante la glaciĝintan tiam profundaĵon, rompintis la frostiĝintan supraĵon, — kaj falis sub la glacian homoj, ĉevaloj...

Tio okazis jam antaŭ tre longe. Je malĝoja memorajo iu starigis la kapelon, kaj ĉiuvespere oni sonorigis por la animoj de l' mortintoj sen la lasta sanktoleigo. La sonorileton oni nomis « sonorileto de dronintoj ».

Ĉiam estis en la vilaĝo maljunulo, kiu por ioma rekompenco iradis sonorigi al la rivero. Okazis foje, kiam iu sonorilisto mortis, ke anoncis sin por la servo vilaĝa servisto, ĝenerale nomata Greĉjo Mizerulo. Li estis filo de riĉa vilaĝano; sed kiam la gepatroj estis mortintaj, la pli aĝa frato senigis lin de la patra heredaĵo, forpelis lin el la hejmo, forrabis lian fianĉinon, kaj mem kun ŝi edziĝis. Restis do Greĉjo en la vasta mondo eĉ sen tegmento super la kapo, sen iu en la animo, kun kolerego kaj kun senkompata envio en la koro.

Li vagis de loko al loko, oni dungis lin al laboro, sed la malprospero persekutis lin, ke li tiel malgrasiĝis kaj malriĉiĝis, ke oni eknomis lin Mizerulo. Li ĵuris eternan venĝon al la frato, je vivo kaj morto.

Fariĝinte sonorilisto, Greĉjo luis por si ĉambreton ĉe la enterigisto en la fino de la vilaĝo, kaj kiam li revenadis post finita laboro, li iradis en la krepusko, post sonorado de la Anĝeluso en la preĝejo, al la kapelo por sonorigi por la animoj de dronintoj.

Unufoje, kiam li revenis hejmen de la laboro, kuris renkonte al li la edzino de l' enterigisto, kriante jam de malproksime: « Malfeliĉo vin trafis, frato via dronis! »

Greĉjo ekhaltis. « Frato? » li deman-

dis, kvazaŭ li ne povus kredi. La enterigistino tiam diris: « Tamen mi diras: frato! Li veturis kun ligno en la arbaron. Proksime de la kapelo la grundo disiĝis, kaj la veturilo falis en la akvon. Ĉion vidis la arbaristo; sed antaŭ ol li povis alkuri, jam ĉio estis finita. Kvankam la homoj penis eltiri la kadavron, estis vane... »

Greĉjo aŭdis kvazaŭ ŝtoniĝinta. Nenion li diris kaj iris en sian kamereton. « Vi sonorigos hodiaŭ por via frato, Mizerulo! » diris ĝemetante la enterigistino, sed Greĉjo nenion al ŝi respondis. Li eniris la ĉambreton, fermis la pordon kaj sidiĝis sur pajlan kuŝejon, kie li ekdormis.

Dum li sidis, tute perdinte la konscion, kaj liaj pensoj malklariĝis, li ne sciis eĉ, ĉu li ĝojas, ĉu li ĉagrenas. Fine li kraĉis kaj diris mallaŭte: « Bone estas tiel al li! » Post unu momento li ripetis pli laŭte: « Bone estas tiel al li — al la maljustulo! » — La granda preĝejo sonorilo komencis sonori la Anĝeluson. Greĉjo aŭdis, apoginte sian mentonon sur la manoj. Li ne kliniĝis kiel kutime, li ne preĝis, li nur aŭskultis. La sonorilo sonoris, kaj ŝajnis al Greĉjo, ke ĝi sonoras pli malĝoje ol ĉiam. Fine ĝi ĉesis.

Nun estis ĝusta tempo por iri en la kapelon. Sed Greĉjo ne leviĝis de la kuŝejo; nur, kun mentono sur la manoj, li sidis kaj rigardis el sub la palpebroj. Forfluis multe da tempo, kiam Greĉjo ekmurmuris tra la dentoj: « Vi ne ĝisatendas tion, ke mi iru tien. Ho, maljustulo tute perdita! Hodiaŭ indas por lia animo... »

Li kraĉis, ĵetiĝis sur la kuŝejon kaj, turninte la vizaĝon al la muro, li volis dormi. Tamen li ne povis, li sidiĝis kiel antaŭe kaj rigardis la teron.

Estis pluva, aŭtuna tago. La vento muĝis kaj hurlis malĝoje, la pluvetado sonadis sur la fenestrovitroj unutone kaj melankolie. Krepuskiĝis pli kaj pli.

« Mi ne iros », diris al si Greĉjo. Li klopodis ree ekdormi, kaj denove li ne povis kuŝi. Io levigis lin de sur la pajlo. Fine li ne povis eĉ sidi. Lin kaptis ia maltrankvileco pli kaj pli; li leviĝis kaj ekstaris ĉe la fenestro. Sed ankaŭ tie ne longe li staris. Ŝajnis al li, ke ekposedis lin io. Li eliris antaŭ la ĉambron. Estis klare, ke io komencis lin puŝi antaŭen, antaŭen...

Li venis al la irvojo, sur kiu oni iris en la kapelon trans paŝtejojn. Li ekhaltis kaj diris: « Mi ne iros! » Kaj refoje li iris antaŭen. la forto puŝis lin. Post la paŝtejoj montriĝis en la krepusko maldense kreskantaj juniperoj, etaj piceoj kaj larikoj. Jam aŭdiĝis muĝo de la ri-

vero. La ĉielo iom klariĝis, kaj supre oni vidis la lunon rondan, nebulan, plumban...

Greĉjo ne sciis, kio en li estiĝis. Li sentis kruelan, vilaĝanan malamon en la koro rilate la mortinton, al la frato, kaj samtempe la devigon proksimiĝi al la kapeleto. Subite li ektemis... ŝajnis al li, ke, krom la muĝado de l' akvo kaj krom vento, li aŭdis iun voĉon, ian sonon...

Li ektimis kaj volis iri returne; sed ia stranga forto, kiu lin ekregis, puŝis lin antaŭen.

Iom post iom tiu sono fariĝis pli distingita: tio ĉi estis la sonorileto!...

Ĉe Greĉjo starigis la haroj sur la kapo; inter piceetoj blankiĝis, en senviva blankeco, en luna brilo, la kapelo ĉe la profundaĵo. Malvarma ŝvito eliĝis sur lia frunto, kaj en la brusto haltis la spiro: en la kapelo estis iu kiu sonorigis. Li haltis kaj ankoraŭfoje volis reiri, sed ia terura scivolo fantomsimila devigis lin iri antaŭen.

Jam li estis ĉe la pordo, kliniĝis kaj enrigardis — kaj, kruciginte la manojn supren, li subite retiriĝis malantaŭen.

Sur la benketeto sidis lia frato, nuda, ŝvelinta, disblovita de akvo, kun malsekaj haroj algluigintaj al la nuko kaj kun ĉirkaŭpremitaj lipharoj, tenante en ambaŭ ŝvelintaj manoj la ŝnureton de la sonorilo, kiun li tiris.

Li turnis al Greĉjo sian blankan, teruran vizaĝon kaj ekrigardis lin per palaj, el okulkavoj eligantaj okuloj. Greĉjo ekĝemis kaj, ruliĝinte, li falegis en la akvan profundon — — —

El la pola lingvo tradukis

Adolf Kerner.

Sonoriloj songe sonoris...

Sonoriloj songe sonoris
Kun plenda tra-ĥora trem'.
Viaj ĥaraj okuloj ploris
Dum lasta manoprem'.

Kaj de vi la vortoj kvin

Adiaŭe sekvis min:

« Ĝis revido — ne forgesu min! »

Miaj pensoj revis kaj revis
Atende de jaro al jar'.
La sopiron superi mi devis,
Disigis nin landoj kaj mar'.

Esperigaj vortoj kvin

Tenis kaj fortigis min:

« Ĝis revido — ne forgesu min! »

Sonoriloj tombaj sonoras,
Ilia funebra sonor'
Amatan ĥoron priploras
Irintan eterne for.

Ĝiaj lastaj vortoj kvin

Ĉie, ĉiam sekvos min:

« Ĝis revido — ne forgesu min! »

Karl Vanselow.

Kortuŝa krio el Sovagejo

Kara Heroldo,

Jen komunikaĵo, kiu havas, mi pensas, amuzan flankon, cetere ĝi enhavas valoran averton:

« Kara ...

Ricevante ĉi tiun letereton, bonvolu tuj viziti mian domon. En mia dormĉambro, en la plej supra el la tirkesto dekstre de la spegulo sur la tualettablo, vi trovos kartonan skatoleton kaj, en ĝi, kompletan falsdentaron, kiun bonvolu sendi al mi kiel eble plej rapide; dume mi estas sendenta!

Kial?

Enlitiĝante, mi kutimas, kiel multaj aliaj homoj, mi suferas, meti miajn falsajn dentojn en glason kun varma akvo. Tiucele mi kutimas ordoni al la servisto: « Alportu varman akvon! » kaj mi miksas ĝin kun malvarma.

Hieraŭ, tre laca post inspekta marŝado, mi forgesis pri tio. Hodiaŭ matene, ĉar mi kampas, por bani mi devis piediri al fonteto iom malproksima. Ironie, mi ekmemoris pri la forlasitaj dentoj, kaj ordonis al la servisto: « Enverŝu varman akvon en la glason, kiu enhavas miajn dentojn! »

Post horduono reveninte de la fonteto, mi brosis la dentojn. Ili kuŝis en varmeta akvo, do evidente la servisto obeis min. Sed kiam mi enmetis la dentojn en la buŝon — konsternego! Ili tute ne taŭgis! Vere mi estis timigita! Kia terura malofta, tropika malsano trafis min? Ĉu efektive la formo de mia buŝo ŝanĝiĝis dum la nokto? Mi palpis la vangojn kaj la makzelojn, mi rapidis enrigardi spegulon. Ne, mia vizaĝo ne aliĝis!

Estis do la dentoj, kiuj tiel strange ŝanĝiĝis? Sendube! Mi alvokis la serviston.

« Vi enverŝis varman akvon laŭ mia ordono, ĉu ne? »

« Jes, sinjoro, eĉ tre varman, bolantan, rekte el la kaldroneto! »

Tiel finiĝis la kariero de bonega (kaj multekosta) dentaro! Mi ĝojas, ke, ne forgesanta la hazardojn de enĝangala ekzistado, kun la perdiĝinta dentaro, mi prudente aĉetis samtempe duplikaton, kiun nun bonvolu sendi al mi kiel eble plej baldaŭ!

Sincere via, N.N.

(Sendis: R.F.V.)

Infana logiko.

Sinjoro sur strato alvokis knabon, dirante al li: « Jen mi donas al vi sep groŝojn; iru al la proksima bakisto kaj aĉetu por mi kringon salitan. Kaj jen mi donas al vi pluajn sep groŝojn, por ke vi aĉetu tian kringon ankaŭ por vi! »

Post mallonga tempo la knabo revenis kun tutplena buŝo, redonante al la sinjoro sep groŝojn. Maĉante li balbultis: « La bakisto havis nur unu kringon!... »

Laŭ melodio amata:

Karl Vanselow:

Mia suno

(Laŭ la itala popol-melodio «O sole mio».)

Ravas la suno en la ruĝ' vespera,
Antaŭ ol for ĝi en la nokton iras.
Kiu ĝin vidas, tiu ĝin admiras
Pro ĝia belo reva, supertera.
Nur unu suno min ravas pli,
La sun' pli bela ĝi estas vi,
Nur vi, nur sole vi
Estu ĉiama sun' por mi.

Ĉesis la vent', mutiĝis ĝia muĝo,
La lastaj nuboj cedas de l' ĉielo,
Kaj reaperas kun ravega belo
La sun' radia en vespera ruĝo.
Nur unu suno ravegas pli,
La pli radia sun' estas vi,
Nur vi, nur sole vi,
Estu la sun', la sun' por mi.

Anekdotoj

Armea tagordono de Napoleono koncerne al Goethe.

Antaŭ kelka tempo estis trovita en la franca armea arkivo jeha armea tagordono el la regada tempo de Napoleono la 1-a. Ĝi koncernas entute « sinjoron von Goethe » kaj tekstas laŭ traduko:

« Granda Armeo, 5-a korpuso, generalmajoro de la stabo.

En la nomo de imperiestra kaj reĝa moŝtoj. Estas malpermesite al ĉiu el la oficiroj kaj soldatoj de la Granda Armeo, ĝeni sinjoron von Goethe, noblan scienciston; male, estas ordonate, ŝirmi lin kaj same lian familion.

La oficiroj, suboficiroj kaj soldatoj de la franca armeo devas trakti sinjoron von Goethe, rekomendindan viron en ĉia signifo de l vorto, pardoneme kaj zorgi pri lia bonfarto.

Okazinte en Weimar, la 16-an de Oktobro 1806.

Angereau, marŝalo,
komandanto de la 5-a korpuso de la
Granda Armeo.

Tiu ĉi dokumento estas karakteriza ne nur por la eminenta korsikano, kies iniciato kaŭzis la supran armean tagordonon, sed ankaŭ por la pozicio de geniulo tiutempa. Goethe kiel nobla sciencisto kaj viro rekomendinda ĉiurilate. Ĉu ankaŭ nun trovus sin imperiestro aŭ generalo, kiuj ŝirmus la domon sur Frauenplan en Weimar kontraŭ bomboj el la aero kaj kontraŭ venengaso? Nu, kaj cetere: ĉu ili scipovus tion?

La generalo.

Kiam okazis la entombigo de Beethoven, miloj kaj miloj da homoj ambaŭflanke randis la funebran procesion; eĉ soldataro kunmarŝis, kaj la ĉerkon sekvis la plej noblaj homoj de la tiama Vieno.

La saman tagon en la urbo alvenis fremdulo, kiu estis mirigita pri tiu arego da homoj kaj pri la solena funebra procesio. Scieme li demandis simplan virinon maljunan, kiu estas la mortinto, kies enterigo surpiedigis tian amason da homoj.

Unue tiu simpla virino mirigite rigardis la sinjoron; poste ŝi ridetis kaj laŭtigis sin: « Nu, vi devas esti vere de tre malproksime, ĉar alie vi ja devus scii, ke mortis la generalo de la muzikantoj!... »

Trad. St. Z.

Rido Sanigas

Klarigo.

— Paĉjo, kial ĉe unu flanko de la fervojo ĉiam staras fostoj kun dratoj?

— Ili estas destinitaj por la telegrafio.

— Sed kial do ĉe la alia flanko ne estas dratoj?

— Tiu flanko estas destinita por la sendrata telegrafio.

Ĉu eble?

Miĉjo « rigardis tro profunde en la glason ». Forlasinte la drinkejon, li iom zigzage balanciĝas hejmen. Dumvoje li kuras kontraŭ sinjoron, kiu tuj servas al li sukan vangfrapon. Mirigite Miĉjo balbutas:

— Ĉu eble? — hik! — mi jam alvenis hejme?

Konversacio.

— Ĉu vi parolas Esperanton?

— Kiu?

— Vi!

— Mi?

— Jes!

— Ne!

En Scheveningen.

— Sed, kara Berta (diris la amikino), ĉu vi frenezigiĝis? Vi ja ne volas tiun oran braceleton kunpreni en la akvon?

— Kaj kiel mi ne kunprenu ĝin?

— Vi ja povus droni!

Kvalito.

La botfaristo alportas al la fama esplorvojaĝisto paron da nove faritaj botoj por lia baldaŭa ekspedicio al la polusaj regionoj.

— Ĉu vi estis kontenta pri la lasta paro, sinjoro profesoro? demandis la botfaristo.

— Certe jes, ili estis la plej bonaj botoj kiujn mi iam manĝis dum miaj esplorvojaĝoj.

Lia scienco.

— Mi metas mian tutan scienccon al viaj piedoj, sinjorino!

— Ĉu vi do estas sciencisto?

— Ne, pedikuristo.

Informiĝo.

— Kiel fartas via edzino?

— Sed, sinjoro profesoro, mi ja estas fraŭlo!

— Ho, jes; ĉu jam delonge?

Interparolo.

— Vi ne plus estas la fianĉo de Berta, ĉu?

— Ne.

— Kiamaniere vi sukcesis pri tio?

— Mi edzinigis ŝin.

Ŝi havas abonon.

— Tiu junulo en la biblioteko vin kisis, ĉu ne?

— Jes, patrino.

— Ĉu tio okazas pli ofte?

— Kompreneble, patrino, mi ja havas abondon.

La konsekvencoj.

— Mi ne tiom timas la malsanojn, kiom iliajn eventualajn konsekvencojn.

— Jes, ankaŭ mi ne jam pagis mian kuracistfakturon.

Ili vidis Romon.

— Kiamaniere vi aranĝis tion, ke vi sukcesis vidi Romon en tri tagoj?

— Tre simple! la edzino rigardis la preĝejojn, la filino la monumentojn kaj muzeojn, kaj mi dume prenis la kafejojn kaj restoraciojn je mia parto.

En la hotelo.

Gasto: « Jen, ĉu do fine iu venas? Mi sonorigis jam kvinfoje. »

Servisto: « La sonorilo ne funkcias, sinjoro. »

Gasto: « Nu, tion oni estus povinta diri al mi, post kiam mi sonorigis la duan fojon. »

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj kiuj mal-longigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

Geedziĝo Nuchamovici-Harabagiu. La 27.6. ge-edziĝis en Bukureŝti (Rumanio) niaj gesamideanoj s-ro S. Nuchamovici kaj f-ino Gisella Harabagiu. Ankaŭ la edziĝ-atestantoj estis esperantistoj: s-ro Henriko Fischer-Galati LK kaj edzino. — Niajn sincerajn bondezirojn!

Resumoj en Esperanto nepre estu aldonataj al gravaj sciencaj kaj filozofiaj faklibroj naci-lingvaj. Ni realigos tion per starigo de **Bibliografiaj Servoj per Esperanto** en kiel eble plej multaj civilizitaj landoj kaj per reciproka kunlaborado. Inter samideanaj intelektuloj, kiuj arde deziras progresigi Esperanton sur ĉi tiu gravega kampo, ni serĉas ankoraŭ kelkajn sindonemajn kunlaborantojn idealistajn en ĉiuj landoj. — Nek politiko, nek altrudo, nek kotizo. — Skribu tuj al: « Esperanto servas! », 11, rue Pougny, Metz-Montigny, Francujo. — Ĉiu fosu sian sulkon! (524)

« **El Verdavalo** ». — Progresintoj kaj komencantoj same ĝuos la rakontojn kaj artikolojn, interesajn kaj amuzajn, pri homoj kaj bestoj de Borneo kaj aliaj aziaj landoj, en « El Verdavalo », n-roj 1 ĝis 3. Tri bone presitaj libretoj, po 16-paĝaj, tre favore recenzitaj en nia gazetar. Unu numero kostas 2 internaciajn respond-kuponojn; la tri jam aperintaj numeroj por 5 kuponoj. — Kurs-vidantoj! Jen neordinara legaĵo, bona sed malkara, por viaj kursanoj. Provu! — Mendu de R. F. Vaughan, Sandakan, B.N. Borneo. (518)

Unua Internacia Filatelie Ekspozicio «BRAPEX», okazonta en Rio-de-Janeiro (Brazilo), de 22-a ĝis 30-a de oktobro 1938. Petu la seslingvan (kun Esperanto!) ilustritan Bultenon! Skribu al: « BRAPEX », Caixa postal 195, Rio-de-Janeiro, Brazilo. (520)

Sinjorino, kiu brodkastas (radiosendas), deziras korespondantinojn kiuj skribos pri ordinaraĵoj aferoj hejmaj (eĉ interŝanĝus receptojn) de siaj landoj, pri kiuj interesiĝos aŭstraliaj virinoj. Reciproke interŝanĝos novaĵojn ktp. Sendu al: « Mary Ann », Sendstacio 3.S.R., Box 193, Shepparton (Victoria), Aŭstralio.

Por la « Verda Semajno », kiu okazos en nia lando je 25.9.-2.10.1938, oni petas alsendon de diversspeca propagandmaterialo (afiŝoj, diversaj prospektoj, broŝuroj, flugfolioj, libroj ktp.). — Jugoslavia Esperanto-Ligo, Daničićeva ul. 2, Zagreb, Jugoslavio. (528)

Nederlando: S-ro N. Zilver, Zach. Jansstraat 53, Amsterdam, deziras poŝtmarkojn kaj bildkartojn el aliaj landoj (Centra Eŭropo nur laŭdeziro). (529)

Mi kolektos kaj deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn kun gesamideanoj de la tuta mondo. Arne Munters, Noret 9, Dala-Järna, Svedujo.

Atentu! Kongresanoj irontaj al aŭ revenontaj de Londono kaj trapasantaj la malnovan Goethe-urbon Frankfurt a.M., estas petataj sin turni al C. Barthel, Wöhlerstr. 14, Frankfurt a.M., Germanujo, — kiu volonte helpos ilin kaj montros al ili la urbon. (521)

Senpage publikigas adresojn de geknaboj, kiuj deziras korespondi, la monata infangazeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., Amsterdam, Nederlando. (453)

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolikismo, senpage povas ricevi ilin de la Internacia Katolika Informejo: Fraterhuis, Vliert, 's-Hertogenbosch, Nederlando. (493)

Poŝtmarkojn mi interŝanĝas kun seriozaj filatel-istoj. Por 500-5000 ĉiam sendos saman kvanton aŭ samvalorajn laŭ Michel Sendu al: Z. Székely, Kossuth u., Pestszentlőrincz, Hungarujo. (Delegito de IEL.) (515)

Mi deziras renkonti pacifistajn esperantistojn en aŭ apud Amsterdam, Antwerpen, Zeebrugge, la 30-an de julio kaj 1-an de aŭgusto. (Aŭ pacifistojn kun Esperanto-interpretanto.) S-ro Haigh, 23 Cromwell Road, Cardiff, Anglujo. (519)

La Meditanto, hektografita gazeto pri spiritaĵoj aŭferoj. Aperas 4-foje dum jaro. Abono 3 internaciaj resp.-kuponoj. Provezemplero 1 resp.-kup. Havebla ĉe: Oskar Jensen, Isafjordo, Islando. (514)

Por interesaj grupvesperoj. Kiu deziras foje havi bonan eksterlandan esperantiston por internaci-karakterata aranĝo, nepre skribu al: Roland Dupuis, Cseh-instruisto de Esperanto, Riksstraatweg 251, Haarlem, Nederlando. (516)

Japanaj studentoj de pedagogia kolegio deziras korespondi kun ĉiulandaj esperantistoj. Bonvolu skribi al: Tukihora-Juzuru, Niŝiokubo 44, Jodobaŝiku, Tokio, Japanujo. (525)

Bonvolu sendi al mi kelkajn poŝtmarkojn de via lando! Interŝanĝe vi ricevos la novajn belajn jubileomarkojn (eldono Septembro proksima). — Adreso: H.L. van Aller, Buijs Ballotstraat 6, Amersfoort, Nederlando.

Fraŭlino tre deziras korespondi kun fraŭloj. Adreso: Brone Laugmin, V. S. Laizuva, Litovujo.

23-jara svedino, interesata de lingvoj, bestoj kaj kreskaĵoj, deziras korespondi. F-ino Ingrid Johansson, nr. 2, Svedala, Svedujo.

Nederlando, 17-jara fraŭlo, deziras korespondi kun la tuta mondo, precipe Skandinavio kaj Islando. Mi volas interŝanĝi poŝtmarkojn. Respondos certe. Adreso: John Bossinga, Juliana-Oord, Laren N.-H., Nederlando.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun gesamideanoj ĉiulandaj. Fraŭlino Denise Bernier, 6 Rue Florimond, Saint-Quentin (Aisne), Francujo.

Korespond-vespero! Esperanto-klubo « Nova Sento » en Den Helder aranĝos korespond-vesperon la 1-an de septembro. Respondo garantiita. Adresu al: S-ro G. de Jong, Boerhaavestraat 56, Den Helder, Nederlando.

BES-Adresaro (nova, 13-a eldono), kun centoj da adresoj de esperantistoj el pli ol 40 landoj, kaj kun 84 portretoj, estas ricevebla por 0.60 gld (inkl. sendkostoj) ĉe: Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando. — Vidu kurztabelon kaj poŝtĉekkontojn en Heroldo n-ro 27/983! (523)

Esperanto kaj la fervojo

Gesperantistoj! Ni bezonas vian helpon! Ni intencas prilabori la administracion de la dana fervojo, por ke ĝi favorigu Esperanton, kaj tia: ni petas ĉiujn, kiuj vizitis Danlandon, ke ili skribu al ni pri la vojaĝo letere aŭ poŝtkarte, ĉu ĝi estis bona, ĉu plaĉis al vi la dana fervojo, ĉu vi havis la ĝojon, ke oni per Esperanto helpis al vi kaj faciligis la vojaĝon, aŭ ĉu vi pro manko de komprenilo estis tute senhelpa en la vagonaro kaj en la stacioj. Ni kompreneble ŝatus ricevi multajn leterojn kun informo pri helpo per Esperanto, ĉar ni volas pruvi al la fervojo, ke Esperanto estas valora; sed ankaŭ plendo pri manko de interkompreniĝo havos efikon, ĉar oni ankoraŭ kredas, ke kelkaj frazoj de naciaj lingvoj sufiĉas por fari longan vojaĝon al fremdaj landoj.

Cetere, se vi havas ian propagandmaterialon, kiu koncernas la fervojon, ni estos tre dankaj ricevi tion.

Jam dum unu jaro mi havas permeson fari Esperantan kurson en nia faka gazeto, kaj multaj fervojistoj interesiĝis, tial ni devas uzi la okazon por fari paŝon antaŭen.

Do! Skribu multnombre por ke ni havu sukceson, al: S-ro Christian Hougaard, Aarhus St., Danlando.

Internacia enketo pri komercaj lernejoj

La bulgara Ministerio por Komercio kaj Industrio per cirkulero V. 736113 de 8.4.1937 enkondukis Esperanton kiel nedevigan lernobjekton en la komercajn lernejojn de nia lando. Post nelonge, en la programo de la bulgaraj komercaj lernejoj estas farotaj gravaj ŝanĝoj. Por ke ni, la esperantistoj, helpu la Ministerion en tiu ĉi tre grava paŝo, ni petas, kiel eble plej baldaŭ respondi la sube-donitajn demandojn, al: Georgi Fr. Dimov, ĵurnalisto, Bul. Dobriĉ 18, Varna, Bulgarujo.

1. Kiaspecaj komercaj lernejoj ekzistas en via lando?
2. Kiom da jaroj daŭras la studado en ili?
3. Kia antaŭa preparado estas postulata de la kandidatoj por la lernejoj?
4. Kiom da horoj semajne daŭras la studado?
5. Kiaj objektoj estas instruataj en la diversaj klasoj (programo)?
6. Kiom da horoj semajne por ĉiu lernobjekto?
7. Kiamaniere oni difinas la sukceson de la lernantoj?
8. Disciplino kaj ĝiaj rimedoj:
 - a) premioj;
 - b) punoj.
9. Nombro de la lernantoj en unu klaso?
10. Rajtoj kaj devoj de la direktoro?
11. Rajtoj kaj devoj de la instruisto, kiu estas ŝarĝita speciale okupi sin pri iu klaso (klas-kuratoro)?
12. Instruistaj kunsidoj?
13. Konsiliĝoj inter gepatroj kaj instruistoj?
14. Fino de la kurso-ekzamenoj kaj diplomoj?
15. Preparado de la kandidat-instruistoj?

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.

